

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

esperanto

107-a jaro • n-ro 1276 (1) » Januaro 2014

Per tango varmiĝi | 16
en Bonaero

Sep Demandoj al | 21
Federico Gobbo

Novelanismo en Burundo | 15
strebas por la edukado

UEA...
UEA...
UEA...

Kien vi iros?

Universala Esperanto Asocio perdis la | 12
sencon pri direkto kaj riskis fariĝi sensignifa
organizo en bolanta mondo, sed...





**Ĝis 2017 multe da bonaj aferoj nepre okazos
en la Esperanto-movado.
Sed nur se ankaŭ vi partoprenos ĝin.**

Estis tempo kiam la Esperanto-movado moviĝis surbaze nur de idealismo, sen planado, sen klaraj celoj je mallonga kaj longa tempo.
Sed la mondo ŝanĝiĝis kaj ni devas kune ŝanĝiĝi.
Pli ol iam ajn, venis la tempo popularigi la UEA-servojn, plifortigi la lokajn kaj la (inter)naciajn esperantistajn organizojn, plibonigi la instruo-sistemon, kapabli la instruistaron, disvolvi novajn projektojn, pliriĉigi la kulturon, inter aliaj farendadoj. Finfine, eliri el la getto, serĉe al novaj laborfrontoj kie Esperanto povos partopreni en la nuntempa lingva tagordo.
Koni nian Strategian Planon estas fundamenta paŝo por ke ni interagru individue kaj enrete.
Tiu estas la defio kiun ni havas antaŭ ni. Jes ja, "ni havas", ĉar se la lingvo estas nur unu, la movado estas tutaĵo konsistanta el ĉiuj kiuj ĝin amas kaj praktikas. Tial ni ĉiuj povas kaj devas kontribui.
Ĝis 2017, multe da bonaj aferoj okazos. Tio dependas ekskluzive de ni.

Por pli da informoj, aliru: www.uea.org/strategialaborplano



Universala Esperanto-Asocio

www.uea.org

Por fariĝi amasmovado

Vi trovas en viaj manoj, aŭ sur via ekrano, renovigitan revuon. Nia nova redaktoro energie ĵetis sin en la laboron por rekoncepti kaj relanĉi ĉi tiun gvidan velsipon de la Esperanta gazetaro. Nun li atendas viajn reagojn, konsilojn kaj kunlaboron en la pluelado.

Mi persone tre ĝojas pro la entuziasmo kaj ambicio de la nova redaktoro, kiu estas kvazaŭ aldona estrarano de UEA, kiu helpas doni direkton kaj agordi la tonon de la tuta asocio. Aliflanke necesas rekoni, ke la renovigo de la revuo estas nur unu paŝo en tiu pli vasta renovigo, kiun celas la nuna estraro.

Enkonduke al la nova jaro kaj prilume al la kovrila temo, mi ŝatus dividi kun vi kelkajn pensojn pri tiu renovigo. Pli ĝuste, pri nur du ŝlosilaj demandoj: kia movado ni fakte estas? Kaj kiel evolui al movado, kiu povas ŝanĝi la mondon?

Plenumo de deziroj

Kiu movadano ne devas foje respondi al la demando, kiom da homoj fakte parolas la lingvon? Kaj oni parolas jen pri dekmiloj, jen pri centmiloj, eĉ foje pri milionoj da esperantistoj, kvankam ni ĉiuj scias, ke en la lastaj jaroj UEA apenaŭ sukcesas kunskrapi kvinmilon da individuaj membroj.

Evidente gravas la difinoj. La KER-ekzamenoj, ekzemple, liveras al ni utilan difinaron, pri lingvokapabloj en niveloj A1 ĝis C2. Ĝis nun la ekzamenojn trapasis, en unu nivelo aŭ alia, ĉirkaŭ 1 400 homoj. Estus bele, se ni povus kreskigi tiun nombron al 14 000, aŭ eĉ al 140 000, ĉar tio komencus doni pli kredindan bildon pri la amplekso de la lingvokomunumo. Kaj tia dokumentado ja apartenas al niaj prioritatoj.

Sed ne tiel, aŭ ne nur tiel, ni ekhavos amasmovadon. Por tio necesas plivastigi nian komprenon de esperantisteco, por inkluzivi ankaŭ niajn samideanojn. Kiel foje skribis Helmut Welger, ni pli bone komprenos Esperanton se ni imagos ĝin, ne kiel lingvon kun interna ideo, sed kiel ideon kun interna lingvo. Kaj tiu ideo – de homa digno, homa solidareco,

egaleca kaj sincera interhoma komunikado en tutmonda skalo – estas tio, kio povas tuŝi la koron de milionoj.

De Kees Ruig, nederlanda fakulo pri enmerkato, mi lastatempe ricevis la konsilon: aĉetantoj ne aĉetas produkton, ili aĉetas dezirplenumiĝon. Do, necesas konscii, ke ni vendas ne nur lingvon. Ni vendas unue, kaj ĉefe, homaranecon.

Paroli kaj aŭskulti

Per homaraneco mi celas la senton, ke oni mem aktive partoprenas en iuspeca tutmonda kulturo – ne simple kiel konsumanto aŭ kliento, sed kiel kunkonstruanto. Tiu kulturo mem, do, estas alia ol la kulturo de la grandaj kompanioj kaj traktatoj. Oni povus nomi ĝin civitana kulturo aŭ, kiel estas proponata en la ĉi-numera



ĉefraporto, kulturo de la tria sektoro. Mia elekto de “homaraneca” omaĝas la pensaron de Zamenhof, al kiu ni ŝuldas pioniran laboron pri ĝia etika bazo.

Kiom da homoj en nia nuntempa mondo sentas ligitcon al tiu homaraneca kulturo? Certe temas pri minoritato: ĉu 2%? 5%? Tutmonde, tamen, temas tutcerte pri dekoj da milionoj. Tiuj homoj estas nia aliancantoj – niaj samideanoj. Multaj el ili verŝajne neniam aŭdis pri Esperanto. Ili estus tamen pretaj subteni ĝin,



Mark Fettes estas prezidanto de UEA kaj profesoro pri edukado en la universitato Simon Fraser (Vankuvero, Kanado). Esperantisto de la jaro 2013.

ĉar ĝi kongruas kun iliaj valoroj, ilia mondbildo.

Por fariĝi amasmovado, ni devos do lerni paroli kun tiuj homoj. Tio signifas ankaŭ lerni aŭskulti ilin. Ni alportas homaranecan rigardon al la lingva sfero; ni elserĉu kaj akceptu homaranecajn kontribuojn en aliaj sferoj. La fakto, ke UEA jam de 65 jaroj emfazas la ŝlosilan gravecon de la homaj rajtoj en nia laboro por Esperanto, estas modelo de tia evoluo; sed ne imagu, ke tie jam finiĝas niaj devoj.

Ĉu la nepoj nin benos?

Tiel tekstas, iom provoke, la unua parto de la kongresa temo de la venonta UK en Bonaero. Pri ĝi vi povos legi pli amplekse alipaĝe. Ĉi tie sufiĉas konstati, ke la temo traktas ĝuste la kampon, kiun mi aludis ĉi tie.

Kial ne ekkoncepti nin kiel movadon por daŭripova evoluo? Aŭ pli bone, kiel edukan movadon por daŭripova mondo? Kiel movado, kies edukado okazas ĉe la radikoj de la homa identeco, en tiu profunde intima, emocia, intuicia nivelo de la lingvokono?

Esperanto: lingvo por daŭripova mondo. Jen slogano por ni en ĉi tiu nova jaro. Slogano, kiu postulas laboron ankaŭ de nia flanko, por kompreni ĝian amplekson, ĝiajn implicojn.

Malgraŭ la saĝo de Zamenhof, ne sufiĉas pacience elteni. Necesas ankaŭ dinamike evolui. Nia renovigita revuo proponas daŭran inviton: evoluu kun ni!

Ĉi-numere

Jen historia numero de la revuo Esperanto! Nova formato, novaj sekcioj, tradiciaj sekcioj nove vestitaj, malpli da tekstoj kaj pli da bildoj kaj fotoj. Elmontriĝas tute reliefe la kovrilo kun sia nova stilo. Ĉeftemo de nun ĉiunumere pripensigos la legantaron. Esperantista ekonomio fariĝas kara temo ĉar ĝi gravegas por la evoluo de Esperanto. Ĝuu ĝisfunde la renovigitan oficialan organon de UEA kaj ne forgesu sekvi ĝin ĉe Guglo+, kie vi povos kritiki, laŭdi, proponi, babilu kun la redaktoro kaj fariĝi aktiva rolulo en la redaktado de via revuo.

Fabrício Valle, San-Paŭlo, Brazilo – <http://bit.ly/19F2jia>

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko) Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon, la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiron bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoro: Fabrício Valle

Konsilisto pri Merkato kaj Reklamado: Paulo Lima

Grafikisto: Cleber Lemes Brito

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Fabrício Valle, Rua Faustolo, 124 – Água Branca
05041-000 San-Paŭlo-SP Brazilo
+55 11 3862-1183

redakcio@revuoesperanto.org
www.facebook.com/revuo.esperanto
www.youtube.com/user/revuoesperanto
esperanto.com/users/revuoesperanto
www.slideshare.net/revuo_esperanto
www.linkedin.com/company/revuo-esperanto
www.ipernity.com/group/revuoesperanto

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Limdato por kontribuoj: la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝi ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam.
(IBAN: NL72INGB000378964681; INGB NL2A) 42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA042605159991; ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

+31-10-436-1044 +31-10-436-1751
uea@co.uea.org www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo



12

Feniksa reago

UEA reagas sur la movadan stagnadon kaj invitas ĉiujn al universala alianco



16

Per tango varmiĝi en Bonaero

Argentino sin preparas por varma kaj fruktodona Universala Kongreso



21

Sep demandoj

Interlingvistiko: de kie ni venas, kien ni intencas iri

Komerco | 5
Komerco ekparolas Esperanton

Diplomatio | 6
Paroli la lingvon de la malamiko

Uneskio | 7
La evoluo de la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo.

Kalejdoskopio | 8
Kalejdoskope pri ĉio

Recenzo | 10
Ebono odoras etoson

Anteno | 11
Socia Komunikado sub pluraj aspektoj

Biblioteko kaj Kongreso | 15
Sociala agado en Burundo kaj kongreso en Meksiko

Felietono | 18
Varieteo

Lingvo-Instruado | 19
La rusa per Esperanto

Unua Alineo | 20
Por komencantoj kaj komencintoj

Artikolo | 22
La unuaj vortoj de la redaktoro B

Estraro

de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Mark Fettes,
2658 E 21st Av Vancouver BC,
Kanado V5M 2H1; +1-778-928-4489;
mfettes@sfu.ca

Vicprezidanto: S-ro Stefan MacGill,
Pannónia u. 30J/6, HU-1136 Budapeŝt,
Hungario; +36 (1) 349 5207;
stefan.macgill@gmail.com

Ĝenerala Sekretario:
S-ro Martin Schäffer, +52 596 924
5144 au +49 30 69 20 48 461;
esperantst@gmail.com.

Membro: S-ro Barbara Pietrzak, UL,
Miedzynarodowa 30/40a m 217, PL-03-
922 Warszawa, Pollando; +48 22 232
79 21 [n]; +48 6000 51 425;
bpietrzak@onet.eu.

Membro: S-ro José Antonio Vergara,
Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio;
+56 65 226660 [n];
+56 65 2326031 [of]; +56 979996705;
joseantonio.vergara@gmail.com.

Membro: S-ro Lee Jungke, 401 dong
301 ho, Donggyun-ro 135, Dongen-ku
Anjangan-ŝi, Kyungki-do, 431-040,
Korea Respubliko; +82 10 3340 5936;
esperanto@saluton.net.

Membro: S-ro Stefano Keller, Case
postale 6034, CH-1002 Lausanne,
Svislando; +41 76 261 06 09;
kellerstefano@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Nico Huisman
Observanto de ILEI: S-ro Mireille Grosjean.

Pri difinitaj aspektoj de la asocia politiko respondacas jenaj subsekcioj (la gvidanto kursiva): Masuma evoluiĝo (financo, administrado, kongresa politiko): Fettes, Schäffer, MacGill, Lee, Monda evoluiĝo (eksteraj rilatoj, informado, esploro kaj dokumentado): Keller, Vergara, Fettes, Pietrzak. Movada evoluiĝo (landa kaj regiona agado, instruado, aktivula trejnad): MacGill, Pietrzak, Lee, Vergara, h1

Pli detale ĉe:
www.uea.org/ku/estraro.html

Komerco ekparolas Esperanton en Ĉinio

■ Wang Tianyi kaj Zhang Tie Zheng

Dum longa tempo Esperanto estis sinonimo nur de internacia amikeco, lingvo de frateco, lingvaj rajtoj, demokratia komunikado, homaraneco, amata ĉevaleto, senengaĝiginta ĝuado kaj similaĵoj, laŭ la gusto de la diversaj grupaj tendencoj en Esperantujo. Paroli pri komerco kaj profito oni apenaŭ toleris. Kelkokaze oni emis ĉe akre kondamni iniciatojn sur la kampo de la esperantista ekonomio, surbaze kaj de dogmoj kiuj ja ne apartenas al la socia fundamento de esperantismo kaj miskompreno pri la interna ideo de Esperanto aŭ iom ĝisdatigite pri tio, ke Esperanto ne estas lingvo kun interna ideo, sed ideo kun interna lingvo, kiel oni povas legi en Malferme. Kaj tiu ideo proklamas ke la lingvo ne apartenas al la esperantistoj, sed al la mondo!

En tiu direkto ekfloras uzo de Esperanto en komerco, en la potenca Ĉinio, sub la iniciato de IKEF, faka asocio aliĝinta al UEA. Ĉu Esperantujo rekonos ke esperantista ekonomio (ne nur komerco!) estas bonvena realaĵo aŭ dogmume blasfemos kontraŭ nerenversebla ondo? Legu kaj voĉdonu ĉe <http://bit.ly/1db8LMr>.

Himno ne mankis...

Komence de novembro 2013, de la 1-a ĝis la 3-a, en la bela urbo Suzhou, provinco Jiangsu (la suda Ĉinio, proksime de Ŝanhajo), okazis la 7-a Jarkunveno de Ĉinaj E-Komercistoj, kadre de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), sub la gvido de Wang Tianyi, longdaŭra esperantisto kaj profesiulo de internacia komerco de multaj jaroj. La solena malfermo okazis sabate, la 2-an, kun estrara tablo, kantado de la himno de Esperanto kaj ceteraj kutimaj proceduroj.

Internacieco estas unu el la karakteroj de la renkontiĝo ĉar en ĝi partoprenis pli ol 40 esperantistoj kaj komercistoj el la tuta Ĉinio kaj ankaŭ el aliaj landoj kiel Brazilo, Koreio, Irano kaj Aŭstralio. La ĉinaj E-komercistoj devenis el Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj 12 provincoj. Pli mozaika etoso regis, finfine.

LEE Sung Woo, la prezidanto de Korea-Ĉina Asocio kaj KIM Yong Jin, la prezidanto de la korea sekcio de IKEF, speciale flugis al

Suzhou por partopreni la eventon. Aŭstralio E-komercisto faris longan vojaĝon por partopreni kaj plimulti siajn kontaktojn.

La kunveno okazis en tute nove konstruita publika edukejo, la Lernejo Dongshahu, situanta kadre de la industria parko de Suzhou, kie plu kaj plu naskiĝas novaj alt-teknologiaj fabrikoj kaj kompanioj, ĉindevenaj kaj ankaŭ el eksterlando, ekzemple el Koreio kaj Singapuro.

Dum la evento, la estraro de Klubo de Ĉinaj Esperantistaj Komercistoj (KCHEK) faris raporton pri la agado de la ĉinaj komercistoj dum la pasinta jaro, laŭdis la novajn iniciatojn sur la kampo de internacia komerco, kiel ekzemple, la vojaĝo de Zhang Tie Zheng al Brazilo por esplori la lokan merkaton de hotelaj matracoj, kaj ankaŭ la agado de Deng Xiaozhong, kun siaj bongustaj vinoj, kiel "Saluton" kaj "Venas al ni" (importitaj el Eŭropo). Li Zong, el la urbo Changsha, parolis pri sia agado kadre de la kolegio kie li laboras.

Dum la lasta tago, dimanĉe, partoprenantoj prezentis siajn kompaniojn kaj varojn al la ĉeestantoj, kiel la aparaton "Sanazono", vibrilon kiun oni uzas sur la talio por detruji grasajon, kaj medikamentojn por plifortigi la sanon. Zhang Tie Zheng montris fotojn de sia vojaĝo en Brazilo dum septembro 2013.

...sed mankas homoj kiuj povas kaj volas labori

Malgraŭ la atingoj kaj sukcesoj de lastaj jaroj, ankoraŭ troviĝas barilo por la daŭra progreso de Esperanto en komerco, nome la manko de lingvokapablaj oficistoj. Oni malfacile trovas oficistojn kiuj povas komunikiĝi kaj skribi kaj paroli en Esperanto. Nuntempe mankas junaj kaj viglaj homoj kiuj povas (kaj volas) labori en Esperantaj kompanioj. La situacio estas iom rondira: mankas oficistoj ĉar neniu volas pene studi (kaj lerni) fremdan lingvon se oni ne havas eblon trovi laboron. Sed se mankas laborforto, la novaj Esperantaj kompanioj ne povas disvolvi negocojn, kreski, perlabori monon kaj prosperi. Kion fari?

Esperanto helpis, helpas kaj helpos nin



Estrara Tablo, de maldekstre: Zhang Tie Zheng, Zhang Changsheng, Jiang Wei Yi kaj Wang Tianyi

Ĉi-jare la kunveno estis organizita de Zheng Tie Zheng (Kiras), veterana esperantisto kaj komerca direktoro de Shuilian Mattress, fakriko de matracoj, helpe de aliaj valoraj amikoj kaj esperantistoj el la loka movado en Suzhou, kiuj pene laboris dum la tuta jaro por la preparado kaj organizado de la jam tradicia jara kunveno de la ĉinaj E-komercistoj.

Li deklaris al la revuo Esperanto, ke "la altnivela Esperanto uzata la tutan tempon estis la plej evidenta kaj kuraĝiga karaktero de la evento. Dum la kunveno preskaŭ ĉiuj parolis Esperanton kaj flue kaj libere. Tiun ĉi fenomenon, por diri la veron, mi unufoje spertis. Harmonia atmosfero, kiun donas al ni nur Esperanto, ĉiam regis en la renkontiĝejo kaj mi multe ĝuis la etoson kaj ege ĝojis, ke jen estas la veraj Esperanto-komercistoj, jen estas la praktikado de Esperanto. Nia jarkunveno estis ĉi-foje sendube tre fruktdona kaj sukcesa. Restas al mi la impresoj, ke Esperanto multe helpis nin en komercado kaj daŭre helpas, helpos nin."

Ne nur el pano vivas la homo

La evento komenciĝis vendrede vespere, kiam okazis la interkonatiĝa vespero kaj la partoprenantoj prezentis sin al la aliaj samideanoj. Kelkaj samideanoj prezentis poste kantojn kaj muzikon.

Sabato, la 2-a, estis la tago de la ĉefa kunsido de la Jarkunveno. En la lasta tago, en la solena malfermo, kantado de la himno de Esperanto, *La Espero*, memoriĝis al la komercemaj partoprenantoj ke ne nur el pano vivas la homo.

Lernesta studento ludas muzikilon en la arta vespero



Paroli la lingvon de la malamiko

La Ĝeneva interkonsento estis leciono pri internacia komunikado, en mondo kie ordinare regas lingva diskriminacio. Paroli la lingvon de la alia partio estis diplomatia ŝlosilo, dum definitivan ŝlosilon, uzatan de esperantistoj, oni ne agnoskas.

■ **Simone Zoppellaro**

Post 12-jara disputo, unua paŝo por la solvo de la irana nuklea problemo estas fine farita. La subskribo de historia interkonsento la 24-an de novembro 2013 en Ĝenevo inter Irano kaj la kvin membroj de la Konsilio de Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj kune kun Germanio (la tiel nomata 5+1) estas grava venko de diplomatio, sed ankaŭ la rezulto de efikaj komunikaj strategioj. Tio signifas ja nek definitivan fermon de la problemo, nek restarigon de kompletaj diplomaciaj rilatoj inter Irano unuflanke kaj Usono kaj Unuiĝinta Reĝlando aliflanke, tamen – kiel prezidanto Obama asertis la tagon mem de la subskribo – “hodiaŭ, diplomatio malfermis novan vojon direkte al mondo, kiu estas pli sekura”.

Kiel okazas malofte en la internacia diplomatio, la personaj emocioj malkaŝis la gravecon de la momento: kaj la brakumo inter John Kerry kaj Catherine Ashton, kaj la mesaĝo de Mohammad Ĉavad Zarif, irana ministro de eksterlandaj aferoj, elsendita en Tvitero iom post la subskribo (“Ni atingis interkonsenton”), estas nerefuteblaj signoj de tio. Sed, fakte, tiun subskribon oni ĝisvenis de malproksime, kaj same la usona kiel la irana registaroj multe investis por ĝia efektivigo.

La rea alproksimiĝo komenciĝis eble jam

la 20-an de marto 2009, kiam Obama interrete alparolis Iranon kaj la irananojn ĉe la okazo de la persa novjaro (Noŭruz): “Ni havas – diris la usona prezidanto en videomesaĝo, kun subteksto en la persa, registrita en la Blanka Domo – gravajn opiniodiferencojn, kiuj kreskis kun la tempo. Mia registaro nun dediĉas sin al diplomatio, kiu traktos la plenan gamon de aferoj antaŭ ni, kaj celas konstruajn ligojn inter Usono, Irano kaj la internacia komunumo”. Sekvis citaĵo de la persa poeto Sadio (“La filoj de Adamo estas korperoj unu de la alia, ĉar ili estas kreitaj el unu esenco”) kaj fine mallonga novjara bondeziro perslingve.

Mi memoras, kiel tiu simpla mesaĝo impresis multajn irananojn, sed tiu estis ankoraŭ la tempo de la regoperiodo de Ahmadinejad, kaj Teherano ankoraŭ ne volis (aŭ ne povis) malfermi dialogon kun Usono. Obama denove registris novan videomesaĝon ĉiujare, akurate ĉe la okazo de la persa novjaro en marto, alparolante la irananojn kaj la reĝimon, kaj denove kun la fina eldiro de perslingva bondeziro.

Aferoj ŝanĝiĝis la 15-an de junio 2013, kiam Hasan Rouhani iĝis la sepa prezidanto de Irano. Ŝanĝo ne nur politika, sed ankaŭ komunikada kaj eĉ lingva: dum la malmultaj monatoj de regado oni rimarkis jam ĉe la

Ron Foster/Shutterstock

Official photo - www.rouhani.ir



**Obama parolis la persan,
Rouhani parolis la anglan.
Tio estas diplomatio.**

nova registaro vastan uzon de sociaj retoj, tre ofte anglalingve, kaj komunikadan aliron en neta malkontinueco kompare al la antaŭa irana registaro.

Oni memoras ekzemple la interretan bondeziron de la ministro Zarif por la Roŝ Haŝana, la juda novjaro, kaj la anglan intervjuon donitan de Rouhani al CNN en septembro: “Mi volas diri tion al la usona popolo: mi portas pacon kaj amikecon de la irananoj al la usonanoj”. Eĉ la longa diplomatia intertraktado, kvazaŭ maratono, komencita la 24-an de septembro kaj fermiĝinta poste multege da tagoj per subskribo de la interkonsento, estis farita de la irananoj tute anglalingve, malsame al la estinteco.

La interkonsento, kiu havas validon de 6 monatoj, malfermas nun gravan periodon de reciproka studo inter la du partioj. Multaj necertaĵoj restas, kaj ankaŭ multe da oponantoj, sed estas ja fine certe, ke la vojo entreprenita de diplomatio estas la ĝusta: kelkajn monatojn antaŭe neniu, mi pensas – en Irano same kiel en Usono –, estus vetinta ion en tiu direkto. Eble la sekreto de la paco estas paroli la lingvon de la malamiko.



Simone Zoppellaro regule aperigas siajn artikolojn ĉe disvastigo.esperanto.it

Enkonduke

UNESKIO estas tre ampleksa rubriko. Ĉio rekte aŭ ne rekte ligita al evoluado de edukado, kulturo kaj scienco, ankaŭ en la movada senco, estos temo por ĉi tiu rubriko. Do antaŭen per UNESKIO, UNESKIE(N), UNESKIA, UNESKIAL, UNESKIEL kaj UNESKIU.

Plurkontinente abundos AMO ĉi-jare

■ **Stefan MacGill**

La Strategia Plano vidas bezonon por pli da trejnitaj aktivuloj por realigi progreson sur niaj kernaj kampoj – konigi nian lingvon pli vaste kaj moderne instrui ĝin. UEA ekprenas gvidan rolon en tio, kunlabore kun landaj agantoj. En 2014 okazos almenaŭ tri seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO), eventuale ses. Jen la unuaj konkretaj elpaŝoj faritaj de la estrara subteamo 'Movado':

AMO-seminario 1

Loko: Horány, Hungario (40 km. de Budapeŝto, sur insulo en la Danubo)

Datoj: 21-24 marto (vendrede ĝis lunde)

Temo: Kiel komuniki efike

Gvidantoj (konfirmotaj): Stefan MacGill (Kiel labori internacie), Veronkia Poór (Kiel prizorgi lokan grupon), Lu Wunsch van Rolshoven (Kiel pretigi gazetarajn komunikojn kaj rilati kun ĵurnalistoj) kaj reprezentanto de E@I (Komunikaj ebloj en komputika mondo).

Ligita aranĝo: Junulara Esperanto-Renkontiĝo (JER) organizata samloke de la hungara sekcio de TEJO (HEJ) inter la 21a kaj 23a de marto. La seminario programo fariĝos integra parto de la JER-programo. Informoj: www.jer.hu

AMO-seminario 2

Loko: Viktorio, Kanado (100 km. de Vankuvero, sur insulo en la Pacifika Oceano)

Datoj: 10-11 julio (ĵaŭde-vendrede)

Temo: Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Norda Ameriko

Gvidantoj planataj: Mark Fettes, Orlando Raola, Humphrey Tonkin

Ligita aranĝo: Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), finiĝonta en la 7an de julio, poste la 62a Landa Kongreso de Esperanto-USA (jul. 11-14). www.esperanto-usa.org

AMO-seminario 3

Loko: Siano (X'ian), Ĉinio

Datoj: 16-23 aŭgusto (sabate ĝis sabate)

Temo: Kongsĉio, Kapabligo kaj Praktiko por nia lingvo Esperanto

Gvidantoj planataj: Ĉielismo Wang, Trezoro Huang Yinbao, Miaohui, Stalino Yuan

Ligita aranĝo: 4-semajna Somera Esperanto-Lernejo, kiu finiĝos en la 23a de aŭgusto. Informoj: www.esperanto.cn/amo

Kadre de la 81a Itala Kongreso apud Trento (aŭg. 23-30) okazos seminario de aktivula trejnado; restas decidi, ĉu tio eniros formale la SPAMO-serion. Deziro por trejnseminario en Afriko ekzistas; en la ĵusa 5a Afrika Kongreso okazis planado por seminario malfrue en 2014. Por ĉiuj seminarioj detalaj pri aliĝado, kotizoj kaj programoj estos rete alireblaj.

Agade, celebrante: Ek al nova jaro!

■ **Stefano Keller**

Ĵus komenciĝis la agadjaro 2014 kaj ni ĉiuj kun nova elano volas, ke en la nova jaro ni estu pli efikaj ol en la pasinta, niaj rezultoj pli multaj kaj pli signifaj ol antaŭe.

Niaj bazaj deziroj movadanaj estas ja konataj: ĉiam pli da homoj parolu Esperanton, estu lingva justeco en la mondo. Krom esti esperantisto, kiel civitanoj de nia lando, kiel homoj, ni luktas ne nur por lingvaj rajtoj, sed ankaŭ pli ĝenerale por la realigo de ĉiuj homaj rajtoj, por paca kunvivado de ĉiuj, por ebligi kaj certigi viveblan futuron ankaŭ por niaj posteuloj.

Niaj kontribuoj tra la jaro estu utilaj eroj aldonitaj al la komuna strebado por pli bona kaj pli justa vivo por ĉiu, por tiel konstrui mondon kun daŭripova evoluo por ĉio kaj ĉiu, en harmonia diverseco.

Kiel gvidilo pri farenadoj, projektoj, povas servi al ni listo de memortagoj, datrevenoj, en kies celebrado ni povas, kaj sekve de la supraj konsideroj, eĉ devas partopreni kune kun ne-esperantistoj. La estrara subteamo de UEA, respondeca pri Monda Evoluo laŭ la laborplano, pretigis kalendaron el datoj elektitaj specife por nia movado. Tiuj eventoj ebligas al ni kontribui al celoj, kiujn la tuta homaro enfokusigas, krome, per nia kunago, ni povas prezenti justan solvon al problemoj de interreta komunikado, daŭripovecon subtenantan, jam de ni praktikatan.

En venontaj revunumeroj aperos priskriboj kaj agadproponoj detalaj pri la unuopaj eventoj. Bone notu nun tiujn ĉi datojn por ĝustatempe povi pretigi vian kunagadon. La monatoj januaro kaj junio, sen proponataj festendaĵoj, permesos al vi pli longan pretiĝon al la alimonataj eventoj. Sed krom tiuj ĉi datoj, eventoj, ekzistas granda kvanto da aliaj okazoj, kiujn ĉiu loka grupo aŭ individua aganto povas trovi kaj alpreni laŭplaĉe en sian agadprogramon.

Jen do la listo de festendaĵoj rekomendataj de UEA:

Februaro 13 – Monda Tago de la Radio [Unesko] 17-23 – Semajno de Internacia Amikeco [esperantistoj] 20 – Monda Tago pri Socia Justeco [UN] 21 – Tago de la gepatra lingvo [Unesko]	Marto 8 – Internacia Virina Tago [UN] 21 – Internacia Tago de la forigo de rasa diskriminacio [UN]	Aprilo 22 – Internacia Tago de la Tero [UN]	Majo 21 – Monda Tago por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluo [UN] 22 – Internacia Tago por Vivo-Diverseco [UN]
Julio 26 – Esperanto-Tago – Lingva justeco [esperantistoj]	Aŭgusto 9 – Internacia Tago de Indigenaj Popoloj de la Mondo [UN] 12 – Internacia Junulara Tago [UN]	Septembro 21 – Internacia Paco-Tago [UN] 26 – Eŭropa Tago de Lingvoj (en eŭropo) 30 – Monda Tago de Tradukado [FIT]	Oktobero 5 – Monda Tago de Instruistoj [Unesko]
Novembro 16 – Internacia Tago de Toleremo [UN]	Decembro 10 – Tago de Homaj Rajtoj 10 – Priesperanta rezolucio de Unesko (Montevideo 1954) [UN/Unesko] 15 – Zamenhof-Tago / Tago de la esperanta libro [esperantistoj]	Internaciaj jardekoj de UN, la ankoraŭ daŭrantaj kaj la ĵus komenciĝinta: <ul style="list-style-type: none"> • 2005-2014: Internacia Jardeko de Edukado por Daŭripova Evoluo [UN] • 2005-2015: Dua Internacia Jardeko de Indigenaj Popoloj de la Mondo [UN] • 2011-2020: UN Internacia Jardeko pri Biodiverseco [UN] • 2013-2022: Internacia Jardeko de Alproksimiĝo de Kulturoj [Unesko] 	

Krom ĉiuj tiuj datoj kaj eventoj, eblas regione konsideri la sekvajn eblojn por agadoj: Internaciaj, naciaj aŭ regionaj eventoj, kiuj rilatas al lingvo, kulturo, etnoj, interreta interŝanĝo, amikeco kaj paco. Ekzemple: Lingvo-salonoj/ekspozicioj; Libro-ekspozicioj/salonoj/foiroj; plurkulturaj festoj, festivaloj; konferencoj, renkontoj – kies liston laŭfakte, laŭteme kaj laŭloke vi certe povos trovi en via regiono. Sukcesplenan agadjaron! <http://uea.org/vikiol/index.php/Festotagoj>

Kalejdoskop

Kiel aperi en Kalejdoskopoj ?

Per sendado de vere unika kaj ĝuinda teksto, sub diversaj aspektoj. Se via asocio faras tion, kion ĉiuj aliaj faras, kiel ĝi reliefiĝos? Se via iniciato, evento, faka agado, persona laboro, novaĵo venos kun speciale grava informo, kun ekskluzivaĵo por la revuo Esperanto, kun vere eksterordinara fakto, via ŝanĉo estos vere granda. Agado ligita al la UEA-novelanismo flanko de landaj, fakaj kaj lokaj asocioj havos avantaĝon. Ne forgesu, ke la revuo Esperanto estas la oficiala organo de UEA, kiu sin ŝetas en travivadon de granda movada epopeo kaj bezonas plifortigi sian universalan aliancon.

Aliflanke, tre ofte vortabunda raporto fariĝos noto en Kalejdoskopoj pro manko de spaco. Ne malbenu la redaktoron pro tio, sed laboru por pli bonaj UEA-financoj, ĉar en revuo kun 48 paĝoj via longega raporto havus duoblan ŝancon. Piaj informoj ĉe <http://bit.ly/1ce1Y86>.



Novelanisme

Arbo plantita burĝonos aprile

En la 14-a de decembro eventokaze estis prezentita fondota NRO sur la kampo de justa komerco kaj etika konsumado, kies laborlingvo estos Esperanto, en Bela Horizonte, granda brazila industria urbo. Arbo estas la nomo de la nova organizo, kiu jam havas fondokomitaton. Ĝi fondiĝos la 19-an de aprilo 2014. Paola Giannini tre ĝuigis la ĉeestantaron per kantado en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto. E-kanto: <http://bit.ly/1956zXp>

Persone

Utho kaj Karl – Ja bibliotekistoj!

AME-Fondaĵo anoncas, ke la premioj de la Esperanto-Kulturpremio 2014, la 14-a, ĉi-foje estas la inĝeniero Utho Maier kaj la apotekisto Karl Heinz Schaeffer, loĝantoj de la urbo Aalen. Ambaŭ meritis la premion pro sia persisto en la engaĝo por la kulturo de internaciaj kompreniloj, specife pri la librokulturo de Esperanto kaj ĝenerale de planlingvoj. Sen iliaj iniciato kaj energia kunhelpado siatempe ne estus garantiata la daŭra pluvivo de la Germana Esperanto-Biblioteko, kiu antaŭ 24 jaroj trovis novan hejmon en la urbo Aalen. La urbestro de la E-urbo Herzberg, Gerhard Walter, pretas prelege laŭdi iliajn meritojn. La premiado okazos kadre de dimanĉa matineo, la 30-an de marto 2014.



Religie



Monda Unio de Bonpo

Esperanto estas adoptita kiel unu el la laborlingvoj de Monda Unio de Bonpo (MUB), celanta diskonigadon de Mahajano, unu el la budhismaj skoloj. Bonpo estas la plej antikva Mahajano, bazita sur altruismo kaj plej vasta sindonado al la popoloj tra la mondo. La esperantistino Eruda Li akceptis la inviton fariĝi honora konsilanto.

Fake



Mankas energio en Esperanto

Roland Schnell (roland.schnell@srh-hochschule-berlin.de), docento pri bioenergio de SRH-Universitato en Berlino, informas ke la universitato proponas trijaran kurson en la angla, kun praktikado, en la fako *Business Administration Renewable Energy*. Rezentantoj de SRH-universitato vizitis Niĝerion en 2013. Per la kurso oni celas realigon de komunaj projektoj kaj komerce vastan kontaktiligon de germanaj entreprenoj de la sektoroj de vento-, akvo- kaj bioenergio. Jen bona agadkampo por E-fakuloj. Mankas terminaro.

Datrevene

Datrevene

Ĉina Radio Internacia komencis siajn elsendojn la 19-an de decembro 1964. La redaktoro, reviziistoj kaj ceteraj kunlaborantoj de la revuo Esperanto gratulegas la tutan stabon de ĈRI. Antaŭen al la 50-jariĝo en 2014!



Olimpiko

La prezidanto de Tomaska Esperanto-Klubo, Konstantin Obrazcov, veturos al la Olimpikoj en Soĉi (Rusio), kiel volontulo. Li pretas helpi al eksterlandaj esperantistoj per interpretado – kobraztsov@mail.ru.



Junulare

Belaj plaĝoj survoje al Bonaero

La 70-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en julio 2014 en la brazila urbo Fortaleza, meze de la vojo inter Eŭropo aŭ Nordameriko kaj Bonaero, kie okazos la UK tuj post la IJK en Brazilo.

Fortalezo estas alloga pro siaj belaj plaĝoj kaj bunta gastronomio. Ekskursoj antaŭ kaj post la kongreso donos al la esperantistoj ŝancon viziti kelkajn el la plej belaj plaĝoj de Brazilo. Estas diversaj loĝejoj por kongresanoj. Atentu pri tio, ke tiuj kiuj pagos la kotizon ĝis la 31-a de januaro gajnos specialan rabaton! <http://ijk.brazilo.net>



Iniciate

Por solidareco, justeco kaj progreso

La ludo de Granma Esperanto-Asocio en Kubo proponas interkonsenton pri kunlaboro kaj kultura interŝanĝo. Se via E-asocio vidas en Esperanto internacian lingvon, kreitan por prezenti ponton de komunikigo, kompreno kaj ambaŭflanka kunlaboro inter homoj de bona volo, kaj konscias pri ĝia historia signifo por solidareco, justeco kaj progreso por ĉiuj, nepre legu la tutan kontrakton por Amikeca Interkonsento pri Kunlaboro ĉe <http://bit.ly/1cZeQ0t>

Kongrese

Novaj Ŝanco, Platformo kaj Aspiro

La temo de la 10-a Ĉina Kongreso de Esperanto tre kongruas kun la novelanismo de UEA: Novaj Ŝanco, Platformo kaj Aspiro. Ĝi okazis la 16-an de novembro en la Zaozhuang-a Universitato, la orienta Ĉinio. Antaŭ la kongreso inauguriĝis Ĉina Esperanto-Muzeo.

La prezidanto de ĈEL, Chen Haosu, en la inaŭgura parolado diris, ke la ideogramo dek signifas en Ĉinio kaj komencon kaj finon, aludante daŭrigon, heredon kaj prosperadon. En la nomo de la eksterlandaj partoprenantoj Ragnar Baldursson mallonge parolis opiniante, ke post ekfunkcio de la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang la E-movada centro probable moviĝos de Eŭropo al Azio. Mark Fettes, prezidanto de UEA, sendis al la kongreso gratulmesaĝon, kiun laŭtlegis Lee Jungkee, ekministro de la UEA-Komisiono pri Azia Esperanto-Movado.

Varmaj diskutoj okazis en kvar grupoj, kun prezentado de resumo pri la diskutitaj temoj. Pri edukado kaj junulara vivo estis speciale fruktorigaj diskutoj. Ne mankis UEA/KER-ekzamenoj. Gestudentoj de la arta fakultato prezentis kantojn, dancon, deklamadon de E-poemoj kaj ludis per tradiciaj instrumentoj.

Partoprenis la kongreson pli ol 300 esperantistoj. La universitato estis taŭga ejo por tiom altnivela kongreso.

Konkurse

Ivan Krestanov invitas

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Esperantan Literaturan Konkurson en la nomo de la eminenta bulgara esperantisto tradukisto Ivan Krestanov. La konkurso estos por:

- Traduko de bulgarlingva rakonto de nuntempa verkisto en Esperanton.
- Eseo pri Ivan Krestanov aŭ pri la rolo de la tradukita Esperanta literaturo en la nuna mondo.

Bonvolu sendi viajn verkojn ĝis la fino de novembro 2014. La rezultoj estos anoncitaj en decembro 2014. Skribu al modest@abv.bg por pliaj informoj.

Persone

Tri kovrilojn Cleber faris



Cleber Lemes Brito estas la profesiulo kiu elpensis la novan fasonadon de la revuo Esperanto kaj ekde nun enpaĝigas ĝin ĉiumonate. Li laboras en granda brazila reklam-entrepreno, kiu servas al tre grandaj klientoj. Aparte, laborante vespere kaj semajnfine, li enkasigas kroman monon per servado al kelkaj tre specialaj klientoj. Li tre ŝatis la ideon labori por internacia revuo kaj proponis ĉipan servon al UEA. Detalo: li preparis tri malsamajn kovrilojn, el kiuj la UEA-estraro elektis tiun, kiun vi vidas.

Junulare

Nova elano al etaj junularaj projektoj

Januare TEJO starigos novan fonduson, kun la emblema nomo *Trampolino*, kiu celas proksimiĝon al la juna aktivularo kaj proponas konkretan helpon kaj subtenon al tiuj, kiuj iel deziras aktivi por Esperanto. Ĉiun duan monaton TEJO disponigos etan monsumon, kiun la junuloj povos peti, sendante sian projekton al la TEJO-estraro, kiu decidos ĉu subteni aŭ ne, ĉu per mono, per konsilado, varbado de kunlaborantoj aŭ per videbligo por la projektoj.

La kapitalo de la fonduso venas el la vendo de la t-ĉemizoj de TEJO kaj de Kontakto, aĉeteblaj ĉe <http://tejo.org/eolt-cxemizoj>. Helpemuloj ĝiru sumon al TEJO-konto "tejdono" ĉe UEA, indikante *Fonduso Trampolino* kiel kialon de la pago.



EBONO ODORAS ETOSOJN

■ Mireille Grosjean

En 328 paĝoj tiu ĉi verko de Kapuściński donas impresan bildon de Afriko. La libro konsistas el 29 ĉapitroj, ĉiu el ili rilatas al iu preciza parto de tiu vastega kontinento. Kiel unu el la tutmonde plej bonaj ĵurnalistoj, la aŭtoro veturis per diversaj iloj, portiloj, bestoj en plej multaj partoj de tiu mondoparto. La leganto akiras impresojn pri etosoj, ekscias faktojn kaj legas analizojn pri konstatoj.

Varmego, odoroj, humideco aŭ sekeco, pluvego aŭ ventego, nuboj aŭ akra suno, steloj kaj luno en dezerta nokto, ŝvitado, laceco, adaptiĝo al novaj temperaturoj kaj al afrikaj fenomenoj – la leganto eksentas la klimaton per ege trafaj observoj plej detale kaj riĉe priskribitaj. Odoroj elvenas el la vortoj kaj paĝoj, kiam la aŭtoro priskribas la vendadon de spicoj en placo; bruoj aŭdiĝas, kiam la aŭtoro aludas pri la stratoj, homamasoj, krioj kaj vokoj. Tagiĝo estas mirinde bela momento en Afriko: muezina voko sonoras samtempe kiel kristanaj kantoj en najbara preĝejo kaj pepado de frumatena koko. Post dumnokta timiga silento venas lumo kaj



Ebono.

Raportoj el

Afriko. Ryszard Kapuściński.

Trad. Tomasz Chmielik.

Bielsko-Biała: Kleks, 2001. 329p.

21cm. Bind. ISBN 837194392X.

Prezo: € 22,50

homa aktivado.

Homoj, socioj, kulturoj kaj kutimoj havas centran lokon. Renkontiĝoj, kontaktoj, kunveturadoj, negocadoj kaj marĉandadoj aperas en siaj sudaj koloroj.

Kapuściński ne nur priskribas! Li ankaŭ prezentas afrikajn faktojn kaj ecojn. Pri la historio de tiu kontinento li bedaŭrinde komencas sian analizon de la momento, kiam blankuloj atingis la marbordojn de diversaj afrikaj regionoj. Ni ne kritikis lin pro tio, ĉar ni konstatas, ke kvazaŭ ĉiuj eŭropaj aŭtoroj same kiel li komplete forgesas la mirindajn sociojn, kiuj ekzistis antaŭ la deksesa jarcento. Endas nove skribi ĉiujn lernolibrojn pri Historio.

La analizo de Kapuściński pri Ruando estas aparte trafa, kiam li uzas por tutsi, utu kaj twa ne la vorton etno, sed tute prave la vorton kasto. Jes ja, tute same analizas tiun fenomenon Kanyana Mutombo, doktoro pri internaciaj rilatoj kaj konsilanto de Unesco pri rasismo kontraŭ nigruloj. Ne temas pri etnoj en Ruando, ĉar etnoj havas sian lingvon kaj sian teritorion, kaj male tutsi, utu kaj twa uzas la saman lingvon kaj vivas sur la sama grundo. En la Esperanto-movado en la apuda lando Burundo troviĝas tiuj tri homgrupoj kaj per Esperanto ili kreas fratajn rilatojn.

Multaj aliaj aspektoj de la kontinento Afriko estas detale analizitaj: politiko, komerco, klimato, socio. Ĉio en abundaj rakontoj, kie homo ĉiam staras centre.

Kompreneble endas reliefigi la mirinde belan tradukon de Tomasz Chmielik. Per abunda vorttrezoro, ĉu rilate al plantonomoj, bestonomoj aŭ arkitekturaj ĵargonaj terminoj, ĉu per kreado de trafaj odoroplenaj aŭ gustoriĉaj kunmetaĵoj, li sukcesas doni al la leganto impresojn sensajn kaj emociajn.

Resume, se vi deziras iom scii pri Afriko, flari la aeron de la frumateno, akiri impresojn, ekkoni faktojn, legu ĉi tiun verkon.

Opinioj pri Ebono: <http://bit.ly/1brMAIE>



Oficiala Informilo

■ DONACOJ

Ĝis la 10-a de decembro

Fondaĵo Azio

Japanio: J. Azjargal, N. Isogai, S. Kuzume, Y. Sawaya. N. Syōzi, M. Tahira – po 14,53; K. Syōzi 65,41.

Sumo ĉi-jara: 3799,90.

Fondaĵo Ameriko

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Usono: J. Johnson 7,29.

Sumo ĉi-jara: 782,45.

Fondaĵo Canuto

Aŭstrio: U. Stecher 10,00.

Finnlando: S. Mynttinen 500,00.

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Sumo ĉi-jara: 4222,01.

Konto Novjorka Oficejo

Finnlando: S. Mynttinen 500,00.

Hispanio: L. Hernández 250,00; R. Uruëña 300,00.

Sumo ĉi-jara: 1683,91.

Konto Espero

Finnlando: S. Mynttinen 500,00.

Hispanio: L. Hernández 250,00; R. Uruëña 200,00.

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Sumo ĉi-jara: 2215,24.

Konto Afriko

Britio: J. Bunting 74,91.

Francio: J.-M. Cash 200,00.

Hispanio: R. Uruëña 150,00.

Nederlando: R. Bossong 10,00; T. van Huis-Staritsky 60,00; H. Wernik 150,00; F.D. Van Zoest 25,00.

Sumo ĉi-jara: 3978,83.

Volontula Fondaĵo

Aŭstrio: S. Stamm 24,00.

Nederlando: T. van Huis-Staritsky 60,00.

Sumo ĉi-jara: 1714,95.

Ĝenerala kaso

Francio: R. Triolle 706,60.

Nederlando: F.D. van Zoest 25,00.

Usono: M. Hammersmith 22,08; J. Johnson 7,29.

Sumo ĉi-jara: 2657,65.



**Kiuj povas donaci?
Ĉiuj kiuj vivas en tiu ĉi mondo!**



slidesha.re/JTp1cQ

Universala Esperanto-Asocio

Anteno

Anteno kaptas la tendencojn, la bonajn iniciatojn, la gravajn movojn okazintajn sur la kampo de la socia komunikado: gazetaro, merkataro, eksteraj rilatoj, lobiado. En kaj ekster Esperantujo.

Ankaŭ TEJO Tutmonde havos novan redaktoron

Stano Marček post 12 jaroj kiel redaktoro de Esperanto transdonis la taskon redakti la revuon de UEA al Fabricio Valle kaj transprenis la redaktorecon de Juna Amiko. Post du jaroj da laborado kun Stano ĉe TEJO Tutmonde, Szabolcs Szilva transdonis la redaktorecon al Massimo Ripani kaj havis intervjuon kun la nova redaktoro, eklaboronta en la nova jaro!

Szabolcs – Bonvolu prezenti vin en kelkaj frazoj.

Massimo – Mi estas Massimo Ripani, itala esperantisto loĝanta en Novoĉeboksarsk (Ĉuvaŝa Respubliko - Rusa Federacio). Mi estis estrarano de Itala Esperantista Junularo kaj de Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko. Nun mi partoprenas en la konsilantaro de Itala Esperanto-Federacio kaj estas la redaktoro de la ret-gazeto Disvastigo (<http://disvastigo.esperanto.it>), kreita de Giorgio Bronzetti, iama TEJO-aktivulo, por disponigi altkvalitan materialon al gazetaro kaj konigi la zamenhofan lingvon inter ne-esperantistoj.

Szabolcs – Ĉu vi aparte interesiĝas pri ĵurnalismo?

Massimo – Ĵurnalismo estas mia profesio. Mi studis en scienc-rilata liceo, tamen mi komprenis ke humanismaj studoj estas pli interesaj por mi. Pro tio, mi elektis poste la fakultaton pri komunikado. Mi laboris kiel sporta ĵurnalisto por la retejo de nia urba piedpilka teamo kaj



Massimo Ripani



Szabolcs Szilva

tio estis vere utila kaj interesa sperto. Mi gvidis la itallingvan programon June Kune, regule elsendatan de nia universitata radio en la provincoj Teramo kaj Ascoli Piceno. Per ĝi mi strebis informi pri Esperanto, kvankvam la manko de stabila kunlaboranto malfaciligis mian laboron kaj min iomete demoralizis. Post la diplomiĝo, mi direktis la programon Lingvoj kaj kulturo, kies temo estis, ĉefe, lingvoj aŭ minoritataj aŭ ne vaste konataj.

Szabolcs – Kial vi decidis kandidatiĝi?

Massimo – Mi decidis kandidatiĝi ĉar mi taksas informadon grava en kaj ekster Esperantujo, kaj mi pensas, ke mia sperto utilos al la agado de TEJO. Kunlaborigi la asociojn kaj profesie laborigi ĉiujn kunlaborantojn estas kernaj punktoj de mia laborplano.

Szabolcs – Ĉu vi ofte legas Esperantajn gazetojn? Kiujn?

Massimo – Mi preferas legi ret-informilojn. Aperis en la lastaj jaroj multe da interesaj blogoj kaj retaj gazetoj, kiuj disponigas kvalitajn novaĵojn. Mi ankaŭ ŝatas, kiam mi havas liberan tempon, legi artikolojn de Tutmondaj Voĉoj. Kontakto de Rogener Pavinski estas tre interesa kaj ĉiam aktuala kaj mi senpacience atendas la tagon kiam mi ricevos la novan revuon Esperanto. Estas tre konsiderinde, ke la lingvo Esperanto estas ne nur celo sed ankaŭ rimedo de informado.

Juna Amiko survoje al plena ĝisdatiĝo



Juna Amiko, la revuo de ILEI por junaj lernantoj, havas novan kaj spertan redaktiston, Stano Marček el Slovakio, kaj iras per nova elano al bonkvalita kaj enhavoriĉa eldonado. En 2014 aperos 4 numeroj. Juna Amiko disponas pri granda skipo de kunlaborantoj kaj kelkaj el ili havas regulan rubrikon. Stefan MacGill, la antaŭa redaktoro, plu kunlaboros. Stano Marček laboras per plej modernaj kaj profesiaj teknikoj kaj havas regulajn kontaktojn kun retaj lernpaŝaroj. La nova redaktoro de Juna Amiko planas disponigi retajn ekzercojn lige kun la enhavo de la revuo.

- La prezo de la abono por unu jaro: Al A-landoj: 16 eŭroj. Al B-landoj: 11 eŭroj (rabato ekde 3 ekzempleroj).
- La abonopago iru al UEA per la konto de Juna Amiko: juna-l.
- La adreso por aboni la revuon: Sébastien Cyprich, Pollando, sebacypr@jabster.pl.
- La adreso de la redaktoro: redaktoro@gmail.com.
- Abonu! Donacu abonon! Lernu amuze per Juna Amiko!
- Konigu la revuon en via loka klubo, landa asocio, ILEI-sekcio!
- Kontribuu per amuzaj rakontoj, enigmoj, ludoj, kantoj!

Bitoteko Biblioteko Juan Régulo Pérez

Bitoteko (substantivo kreita el BIToj kaj bibliOTEKO) estas projekto kies celo estas rete registri eldonaĵojn, verkojn, dokumentojn, kiuj estas ligitaj kun Esperanto. Danke al la sindona laboro de esperantistoj de Hispana

Esperanto-Federacio, la kolekto de Bitoteko en 2013 havis jam 3 500 dokumentojn kaj daŭre pligrandiĝas. Jen la ligilo al tiu valora kolekto: <http://bit.ly/1hRe0GV>.

Feniksa reago per revo kaj planado, kredo kaj agado

Organizaĵo pli-ol-centjara povas havi nur problemojn, kiam la mondo en kiu ĝi estis kreita ĉesas ekzisti. Sed en tute nove bolanta mondo, UEA prenas kiel startpunkton la tradicion pri revado kaj kredado de la esperantistoj, kaj aldonas al ĝi ennoviĝemon, planado por reagi kaj ekboli kune kun la mondo.

El la redakcio

Ĉi-tiu teksto estis redaktita surbaze de frazoj de poemaro plukitaj el Nova Esperanta Krestomatio

En 1908, de l' movada aglo estis hom' – Hector Hodler – kreinto. Ĉu ĝi estas bela? Forta? Bona? Jes kaj jes kaj jes. Jen en la mondon venis nova internacia organizo, UEA. Tra la mondo iras forto voko, per flugiloj de alten soranta internacia ne-registara organizo. Kolektiĝas kompetentaj batalantoj kaj de faro al faro, sub la signo de l' senĉesa agado, rapide kreskas la afero per la laboro de ĝia membraro, kontraŭ ĉiuj mokoj kaj batoj. Ne ĝin timigas noktaj fantomoj! Kun febra avido de neofito, UEA logas al universala alianco landajn asociojn el foraj teroj el kvin mondopartoj. De loko al loko, ĝi tiras la movadan agantaron. Spite ĉiujn barojn, l' afero kreskas kaj progresas. Fajron oni sentas interne, en 1954: kion izola homo povas fari en mondo ŝajne blinda kaj freneza? Tion ĉi: perlas per la belo stelo-stilo, kun facilco ŝprucas Esperanto – la unua Unekso rezolucio. Pliaj venas, eĉ unu antaŭ nelonge. Jam cent jarojn UEA kreskas: sprosas, burĝonas kaj ekfloras vive.

Agordu la brustojn, ho nia membrar', por nova, pli vigla jam kanto! Ĝi sonu potence de montoj al mar', anoncu al ĉiu dormanto, ke novaĵoj torentas – ĉiuj atentis l' anoncon kondukistan: jen tutmondiĝo kaj Teknologio de Informado kaj Komunikado (TIK).

UEA perdas la sencon pri direkto. Tre

paradokse, altaj montegoj konfuzas ĝin – la aglon movadan. La kor' batas maltrankvile, pri movado detruita. Ho vere, sur ĝi pezas prema Fato: floradon novan sekvas nova bato kaj krizoj mortminacaj.

UEA, peno kaj laboro, ĉio stagnas! La UEA-kasisto konstatas, ke la kaso fastadas, ĉar la esperantoj observas la devizon esperantistan, ĉiorezistan: neniam pagi kotizon! Tial do UEA, preskaŭ sen okupo, hurlas kiel malsata lupu.

Ni vivas en tempo nenifara, vaka! Ni ankoraŭ longe devas plu atendi feniksaran reagon. Ho, samideanoj ventokapaj blasfeme diras tion al ni, sed vane, ĉar en niaj cerboj ja ne kreskas herbo! Bela estas la pilgrimo en real' aŭ en animo al la rezulto rara de persisto senompara. Kaj plu daŭras la laboro en nova jarcento, pike bolanta. Tra densa lumo de novaj ebloj brilegas la celo, al kiu AME kaj teame ni iras. Ho amiko, UEA venke staros ĉe la celo, kaj jen sur via umbiliko kreskos la nova marko el la roterdama kapo.

Por ke tio ĉi konkretiĝu, nur unu afereton ni devas scipovi: krei movadon taŭgan por la nova epoko. Sentime rigardi en pupilon de la moderna vivo, aktuala, kruda. Helpos nin ĉi mirindaĵaro supertaŭga: 12 prioritatoj zorge elpensitaj, troveblaj en nia strategia plan'.

Ne estas nur fido. Subtenas faktoj. Jes ja,

tio nin subtenas dum baraktoj, ke, dum debat', al ni ne mankas faktoj. Aldone ni klarigas ke la movado estas socia fenomeno, kreaĵo de sociaj intertraktoj, kaj ĝin modifas la ŝanĝita sceno.

La revo estas ĉio. Kaj kuraĝo: kiom da homoj plu samideane tra la tuta mond' pretas labori ĝis elĉerpiĝo por la afero - konkretigo de UEA-plan'? Nia diligenta membraro, certe en laboro vigla ne laciĝos, ĝis la bona plano de l' organizo per superba kresk' elefektiviĝos. Jes ja, ĉi sindono daŭros ĝis - iam - nin sukceso fine laŭros.



La malfacila vojo al la koro de la mondo

La mondo, kiun Esperanto volas konvinki, ne cedas al la logoj de l' ideo de internacia lingvo. Ne ekzistas rekta linio de la prezento de la ideo al la raviĝo pri nia afero. Do, restas al la esperantoj plu kaj plu klopodadi. Kiel la knabo de tiu ĉi video:

<http://bit.ly/18SUi8s>



Ni apartenas al la tria sektoro

La unua sektoro estas la registaro, la ŝtato: publikaj rimedoj por publikaj celoj. La dua, la privataj entreprenoj: privataj rimedoj por privataj celoj. La tria: privataj rimedoj por publikaj celoj. Temas pri la kampo de la NROj, kiel UEA, la landaj, fakaj kaj ĉiuj lokaj organizoj en Esperantujo.

Ĝis nun la esperantistoj vidis sin kiel membrojn de apartismaj kluboj kaj asocioj de Esperanto, kun pli malpli tre spontanea kaj svaga agado por tre klara ideo. Tio ĉi bone funkciis en la unua jarcento de Esperanto, dum la lingvo baraktadis por fariĝi vivanta lingvo per akiro de literaturo, kulturo, historio kaj vigla komunumo. Nu, tiel ĉi la

Esperanto-movado brile sukcesis plenumi sian historian mision: vivantigi Esperanton kaj doni al ĝi lingvan stabilecon, spite ĉiujn skismojn kaj senlancan (ĝishodiaŭan) reformemon.

Tamen, la nuntempa misio estas tute alia: disvolvi aplikadon de Esperanto kaj fari el ĝi lingvon de kaj por la mondo, tute agnoskita

de ĝi. Tion ĉi la esperantistoj sukcesos nur per memkonscio, ke la E-organizaro apartenas al la tiel nomata Tria Sektoro, granda socia tutaĵo prezentanta specifajn strukturon, agadmanieron kaj kulturon.

La tria sektoro havas siajn propraj trajtojn, el kiuj ni prezentas kvin:

Agado sen profitaj celoj

Oni ne povas distribui eventualan profiton al estraranoj kaj membroj de la organizo. Profito estas ĉiam ree investata en la organizon mem, en la plenumado de la laŭstatuta celaro. Aliflanke, estas ne pli ol dogmo la ideo ke ĉion oni devas fari nur per volontula laboro kaj ke decidi por la profesiigo de la baza strukturo de niaj organizoj estas abomenaĵo ne akceptebla de la E-idealistoj. Esperanto mem, kiel propedeŭtika lingvo de nova industrio de lingvo-instruado, estu la ĉefa fonto de enspezo – kaj profito – por la E-asociaro.

Volontula laboro

Kvankam estas tute akceptebla la ideo, ke NRO havu profesionan stabon (UEA-oficistojn en la Centra Oficejo), granda parto de la laboro estas plenumata de volontuloj (vi, kiu legas). Ĝis nun regis sole la volontula laboro en la E-movado, sed por atingi pli ambiciajn celojn sur la kampo de aplikado de Esperanto (fakaj asocioj) kaj plenumado de la ĝeneralaj celoj de UEA kaj aliancanoj, pli kaj pli profesiaj staboj kaj mono, mono kaj mono estos bezonataj. Kompreneble, la fundamento ĉiam estos la volontula laboro.

Strategia Planado

Ĉiu vera NRO havas sian strategian planon, kiu rolas kiel mapo kaj kompas. Nur en la disvolvado kaj plenumado de la misio la praktikaj detaloj aperas. Adoptinte laborplanon, UEA faris grandan paŝon por eskapi el sia senelira situacio kaj savi la movadon de stagno kaj inercio. Ankaŭ landaj, fakaj kaj lokaj asocioj devas havigi al si strategian planon, ligitan al la strategia plano de UEA. Per tio la movado soros tre altan.

Identeco per propra kulturo

Ĉiu agadkampo de la tria sektoro postulas specifajn alrigardojn, propran manieron vidi la mondon kaj rilati kun ĝi. Tiu identeco ne mankas al la tria E-sektoro, kiu konsistas el maturiĝinta movado por plena partopreno en la mondo de la rekonitaj NROj. De la interna ideo de Esperanto ĝis la diversaj tendencoj de la movado, kiel fundamenta esperantismo, finvenkismo, raŭmismo, Manifesto de Prago, Uneskismo kaj plej laste novnaskitaj tendencoj por aplikado de Esperanto, ĉio donas al la E-movado frapantan identecon.

Unueco en la agado

Io, kio mankis ĝis nun en Esperantujo, estas la alprenado de efika labormaniero, nova aliro al edukado de la volontula esperantuja homfortego, efikaj proceduroj por agado kaj ĉefe unueco en la diverseco kaj ne malunueco pro la diverseco, kiel ĝis nun. UEA proponas ĉion ĉi pere de iu novelanismo, kies starpunkto estas la plenumado de sia strategia laborplano. Per tio Esperanto akiras tion, kio mankas: grandan disvastiĝon kaj la eblon kontribui konkrete por pli bona mondo. Aliflanke, UEA kun sia universala alianco akiras grandegan prestiĝon kaj agnoskon kiel grava internacia ne-registara organizaro.

La reago estas survoje

Delonge oni diras, ke UEA kun sia universala alianco stagnas. Prave! Sed granda reago jam estas survoje, kies ĉefa fonto de inspiro estas la Strategia Plano de UEA. Unuavide ĝi estas kompleksa dokumento, sed oni povas legi ĉe <http://bit.ly/1gDkOrj> koncizan prezenton. La plena plano taŭgas ĉefe por tiuj, kiuj deziras havi ĝisfundan komprenon pri la novaj padoj trairendaj de UEA. Por la unuopaj esperantistoj, landaj, fakaj kaj lokaj asocioj sufiĉas la firma engaĝiĝo en unu el la teamoj kaj sub-teamoj por la praktika agado. Legu ĉi-sube kiel vi povas partopreni la universalan aliancon de UEA por la partoprenigo de Esperanto en la vivon de mondo kiu bezonegas ĝin, sed absolute ne scias, ke tia lingvo, kia estas Esperanto, ekzistas.

KIU ĈEFMOTORAS
UEA kun sia strategia plano

LA DEFIO
Partoprenigi la E-organizaron

1 Parolu la saman lingvon

La mondo stumblas sur la malfacilaĵoj de lingva diverseco, dum ni, sen lingvaj baroj, stumblas pro manko de strategio. Paroli la lingvon de UEA, ĉefmatora organizo de la esperantoj ekde 1908, estas la unua paŝo. Ekparolu la strategian UEA-lingvon.

2 Komprenu la interrilatojn

Oni ne rigardu la planon unuavice kiel liston de farendaĵoj, sed kiel mapon, kiu montras la interrilatojn inter la multaj diversaj facetoj de la E-movado kaj la specifaj strukturoj kaj agadoj de UEA.

3 Elektu vian agadkampon

Konsciigo, Kapabligo, Komununo kaj Kunordigo. La plano donas bazan direkton por tiuj ĉi agadkampoj. Organizaĵoj el la universala alianco devas kontribui per engaĝo de siaj membroj en unu el tiuj agadkampoj.

4 Enteamiĝu por saĝaj decidoj

La esenco de la Plano resumas 12 strategiajn prioritatojn por la agadkampoj. Partoprenante en la UEA-teamoj estas eble fari saĝajn decidojn pri la bezonoj kaj rimedoj por la prioritata laboro. Gravus do enteamiĝi.

5 Kultivu celkonscion

La Plano sendube enhavas mankojn kaj povas impresi tre ambicie por niaj limigitaj rimedoj. Sed ĝi taŭgos ankaŭ por stimuli kunpensadon, diskutadon kaj pli celkonscian kunlaboron sur ĉiuj niveloj de la UEA-strukturo.

Burundo

Biblioteko en Burundo jam ne sufiĉas

■ Johan Derks

Dek kvin mil eŭroj iris al Rumonge por konstruo de biblioteko por esperantistoj, sed la fondaĵo Esperanto en Evoluo (EeE) jam bezonas pli da mono por elkonstruigi du klasĉambrojn. Kio estas la utilo de tiu multekosta entrepreno – € 15 000 nur por aĉeto de la tereno kaj konstruado?

Nur per bildoj oni povas prezenti la penon kaj la ĝojon, kiun la planado, intertraktado, konstruado kaj malfermo de la nova biblioteko en Rumonge donis al la lokaj gvidantoj kaj iliaj sekvantoj.

La iniciatintoj volis ne nur Esperanto-

Burundanoj festas la novan bibliotekojn



centron, sed centron, kiu funkcias ankaŭ por ne-esperantistoj. Tiu plano ĝis nun ne prosperis, pro manko de financaj rimedoj, sed certe la strategio, ke disvastigado de Esperanto ligiĝu kun pli ĝenerala celo, kvazaŭ iu novtipa esperantismo, ĝisfunde stimulas la tutmondan esperantistaron al engaĝiĝo en tiuspecajn iniciatojn.

Burundanoj laboregas ekde 2005 por diskonigi la idealon de Esperanto: lingvo de paco (konkreta celo en lando, kiu suferis multege pro la bataloj inter hutuoj kaj tucioj dum la Afrika Mondmilito). Same kiel en

sovetaĵaj tempoj Esperanto malfermis fenestron por orientanoj al la okcidenta mondo, tiel nun Esperanto malfermis fenestron por afrikanoj al la evoluinta mondo. Danke al propra klopodado sub gvido de Association Nationale d'Espéranto au Burundi (ANEB) nun ekzistas naŭ kluboj en Rumonge kaj kvardek en la tuta lando. La lernantoj estas preskaŭ ĉiuj junuloj, ofte lernejoj.

Vi povas sendi lerno- aŭ legolibrojn kaj viajn librojn francajn kaj Esperantajn al: BP 170, Rumonge, BURUNDO.

E-Kongreso - Meksiko

Orboj partoprenis meksikan E-kongreson

■ Fábio Monteiro

En kiu lando oni povas drinki Esperanton dum kongreso? Certe en Meksiko ĉar tie estas tekilo nomata Esperanto, tre bonkvalita laŭ la kongresantoj kiuj ĝin gustumis. Sentekilume prelegis pri vegetarismo la junulo Victor Argüelle, kiu asertis ke “ne nur la sanon de la homoj, sed ankaŭ la mondon vegetarismo povas plibonigi, ĉar ĝi helpas batali kontraŭ malsato, plibonigas la medion, la vivon de la bestoj. Ĝi havas nur pozitivajn aspektojn”, li diris.

Martin Schäffer, ĝenerala sekretario de UEA, opiniis prelege ke “ni devas labori pli profesie”. Dum la prelego oni diskutis kiel helpi la realigon de la strategia plano de la organizo, kies estrarano li estas. Orlando Raola, prezidanto de Esperanto-USA, siavice

prelegis pri evoluigo de lingvaj kapabloj kaj sociaj retoj en Esperanto. Intervjuate de la revuo Esperanto, li diris “mi komparis la manieron laŭ kiu la homoj lernas Esperanton nun al tiu de la periodo antaŭ la ekesto de interreto kaj sociaj retoj. La ŝanĝoj estas nekredablaj! Kaj ni devas lerni kiel pli bone profiti tiujn novajn komunikrimedojn”. Fábio Monteiro, ano de la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la IJK de TEJO, donis ĉiujn informojn pri la venonta IJK, en Brazilo (legu pri tio en Kalejdoskopio – paĝo 99, kaj en la februara numero de la revuo Esperanto). Joaquín Rosillo prelegis pri la orboj, grandega mistero. Ĉu vi iam aŭdis pri ili? “Kiam ni fotas, kelkfoje ni povas vidi ilin. Orboj estas specialaj makuloj aŭ lumoj kiuj aperas sur fotoj. Ĝenerale, ili aperas kie estas gajeco, feliĉo, kaj pozitiva energio”,

instruis la preleganto. La plej interesa afero estas ke post la prelego, oni freneze fotis ĉion en la ĉambro, celante kapti orbojn. Laŭ la preleganto, ili ofte vizitas E-aranĝojn kaj certe partoprenas la meksikan E-kongreson. Ĉu ili parolas Esperanton, neniu sciis informi.

Kiel ordinare okazas, ne mankis distraĵoj kiel ludoj, pentrado, karaokeo, spektado de filmoj kaj ekskursoj. Elstaris la arta vespero, kun grandiozaj spektakloj pri meksikaj tradiciaj dancoj kaj muziko, infana E-teatraĵo kaj E-kantoj. Laŭ multaj kongresanoj ĝi fariĝis kulmina punkto de la tuta programo, pro la neordinare alta nivelo. Guadalupe Vega Acosta, la ĉefa ano de LKK, konfesis emocije, ke “Mi estas tre kontenta, ege feliĉa, ĉar ni havis tre bonajn momentojn kaj sukcesan kongreson”.



La pasio en ĉiu paŝo

■ Jorge Enrique Cabrera

Tango. *Bonaera* danco, populara kaj internacie disvastigita, de paro ligita. Priskribi tanton per vortoj postulas multe pli. Tiu ĉi artikolo celas ĝin priskribi, kaj ankaŭ la bonaeran kuntekston, sed la legantaro multe pli facile komprenos kio estas tango kaj kion ĝi signifas por *Argentino*, farante la unuan paŝon ne per legado, sed per ĝuado - <http://bit.ly/1fpUkX8> (danco), <http://bit.ly/1j2LuDD> (kantoj) kaj <http://bit.ly/1crJJa4> (per piano).

Arĝenta murmuro, jen vide, jen aŭde, jen spirite. *Bonaero* kantas bonvenigante kaj per varma brakumo fariĝas lulilo de deziroj por siaj vizitantoj. Mano sur zono, vango apud vango, la proksimiĝo de la korpoj, la pasio en ĉiu paŝo laŭ preciza kaj firma gvidado de la viro, sub la rozkolora duonlumo de la kabaredo. Tiel sin movus *Ludoviko Zamenhof* kaj *Klara Silbernik*, dancante tangon, se okaze en 1887 ili vizitintus la *Parizon* de *Sudameriko*.

Parizeca en ĉiu konstruaĵo, hispaneca en sia tradicio, indiĝena en siaj profundaj radikoj, italeca ĝisoste en la ĉiutaga vivo, la *Bonaera* koro pulsas vigle per agrabla mozaiko da ritmoj: fandango, habanero, kandombo, milongo, tango, bolero, ĵazo, svingo, punko, popo, rokmuziko, metalroko, hiphopo, regeo, klasika, ĥora. Laŭ subtila takto de interna tamburo la amaso trairas la urbegon. En ĉiu kvartalo la argentina pasio diktas la ritmon de l' vivo.

Iom da historio

Post la unua triono de la 19-a jarcento

fandango, habanero, milongo i.a. konsistigis tangon, kiu origine danceca, evoluis rapide al kanzona populara muziko internacie disvastigita.

En la stratoj de *Bonaero*, en fifamaj kvartaloj la viroj praktikis inter si mem paŝojn de tango, dum atendado, enironte en la bordelojn - dancejojn kaj kafejojn de tiuj jaroj.

Laŭ eldiro de verkistoj, tango dance havas tiun originon, en la fidomoj. Poste, kiam la junaj riĉuloj impertinente, amuziĝeme kaj brueme kunportis ĝin al Parizo, tie ĉiuj aplaŭdis la novaĵon. Tiam tango revenis en *Bonaeron* kaj fariĝis socie bone akceptita. Ekfloris ĝiaj danco, kanto kaj verkoj. *Carlos Gardel*, La mutulo, nomita tiel pro la bonaera kutimo nomi iun kontraŭe al lia karaktera aspekto, tuj fariĝis kantisto mondkonata.

Paroli pri tango-historio postulas doktorecon pri poezio, danco kaj muziko. De la bordeleca deveno al la elstara komponisto *Astor Piazzola*, tango naskiĝis bruega kaj senĝena, provokema ĝis plena allogo en ĉiu kontakto, en ĉiu atendita kaj anhelita tuŝeto. Tia estas la volupteca kerno de ĝia origino. Poloj, francoj, hispanoj, italoj, ĉiulandaj enmigrintoj eksvarmis scivolemaj, kaj dancemaj, en sia nova lando. La mita kaj sovaĝa gaŭĉo de la kamparo senfortiĝis kaj velkis sub la influo de la ekfuroraĵo. Ĉi-kuntekste, fine de la 19-a jarcento, en la impona haveno de *Bonaero* ŝvebis en la aero la spirito de la kreskanta sento de unika momento: la naskiĝo de la moderna *Argentino*.

Ritmoj kaj koloroj de la urbo



Ruĝa, blanka, ora, blua estas la rubandoj de *River Plate* kaj *Boca Juniors*, futbalaj kluboj naskiĝintaj ene de la sama urba zono kaj – sep diabloj kaj unu diablino – oni ne scias kial kaj kiel, ili poreterne fariĝis akregaj rivaloj. La multkolora kvartalo de *La Boca!* Tie komenciĝas kolorigo kiel lavango el farbo elverŝita disde la ŝipoj en la tutan kvartalon. Picejoj. Stare, sidante, piedirante, matene, vespere, nokte, multmaniere kaj en ĉiu horo oni povas manĝi picon.

Kiam la agrabla nokta babilado plilongiĝas kaj post manĝado de pico kun vino la mateno alproksimiĝas, sekvu neonan lumon kaj envenu en *La Giralda*, kie oni servas la tutan tagon kaj la tutan nokton, kaj matenmanĝu varman ĉokoladon kun benjetoj, specialaĵon de la kafejo, plaĉe alportitan de kelneroj vestitaj kun kitelo laŭ la tradicio de havena kelnero.

Kiam oniaj piedoj eksuferas pro la longa irado, oni kaptas la okazon por halti kelkajn minutojn kaj enmeti ilin en fontanon de la *Placo de Majo*, la sama kie ekzakte tion faris la senĉemizuloj* por mildigi sian pieddoloron post piedmarŝado – dum horoj en varmega tago – el ĉiuj partoj kaj ĉirkaŭaĵoj de la urbo, por postuli la liberigon de la enkarcerigita Juan Domingo Perón, antaŭ sesdek ok jaroj – la 17-an de oktobro 1945,



Kongresa Temo

Kiam naskiĝis Esperanto, al multaj ŝajnis evidente, ke la okcidenta civilizacio iom post iom disvastiĝas tra la mondo, kreante modelon de estonta tuthomara socio.

Malmultaj demandis sin tiam pri la vivkapablo de tiu evolumodelo. Jaron post jaro aperis novaj teknikaj inventoj, novaj sciencaj malkovroj, novaj institucioj kiuj promesis pli racian, sekuran, prosperan estontecon.

Sed pasis jarcento kaj kvarono. Daŭras la scienca kaj teknika progreso, sed samtempe kreskas la indikoj, ke tiu socia modelo ne povas funkcii je planeda skalo. Tial multloke kaj multnivele disvolviĝas provoj ŝanĝi nian evolumodelon, al io pli justa, pli ŝparema, pli vivkonforma.

Klare Esperanto mem konsistigas unu el tiuj provoj. Strebante ŝanĝi la mondan lingvan reĝimon, ni samtempe laboras por la konservado de lingva kaj kultura diverseco, kaj por la protektado de lingvaj rajtoj kaj lingva justeco. Malfacilas imagi daŭripovan mondan socion sen tiuj kvalitoj.

Sed eĉ sur la lingva kampo, Esperanto ne povas sukcesi en izolo. Necesas multaj aliaj ŝanĝoj, ekzemple en la rekonio kaj prizorgado de indiĝenaj lingvoj, aŭ en la havebleco de interpretaj servoj por migrintoj, aŭ en la disvolvado de plurlingva instruado en lernejoj. Ni povas multe lerni de aktivuloj kaj esploristoj pri tiaj temoj.

Kaj la lingva kampo estas nur unu el pluraj gravaj dimensioj en la streboj al daŭripova estonteco. Tradicie, oni parols pri “tri kolonoj” de tiuj streboj: la ekonomio, la socio, kaj la naturo. Laborante por Esperanto, ni devas esti pretaj kundiskuti kun aktivuloj sur ĉiuj tiuj kampoj, kleriĝi pri iliaj problemoj kaj solvoproponoj, kaj trovi taŭgajn formojn de kunlaboro.

La temo de la 99a Universala Kongreso en Bonaero, Argentino, invitas nin al vasta esplorado kaj kundiskutado pri tiaj evoludirektoj. Markante la finon de la Jardeko de Edukado por Daŭripova Evoluo (2005-2014), sub aŭspicio de Unesko, la kongreso celos samtempe montri promesplanan vojon por la Esperanta idearo – novan, aktualan manieron respondi al la demando, pro kio Esperanto?

En la monatoj antaŭ la kongreso, UEA proponos al kluboj kaj asocioj tra la mondo diversajn diskutmaterialojn, celante ĉerpi el la riĉaj ideoj kaj spertoj de aktivuloj el multaj landoj. Eĉ se vi ne povas veni al Bonaero, eblos kontribui alimaniere al la kongresaj laboroj. Ja ankaŭ tio estas daŭripova evoluo.

muziko. Junuloj estas amikemaj kaj ĉiam pretaj por distra konversacio. Aliflanke en pluraj kafejoj de la urbo oni permesas al la publiko uzi la scenejon kaj improvizi artan prezentadon, sole aŭ kune kun sia bando, kaj antaŭ la publiko sin esprimi tute sen baroj.

Malpermesite ne tuŝi

Por tiuj, kiuj ŝatas muzeon, bonaj opcioj estas *Malba*, *Belaj Artoj*, *Naturaj Sciencoj* kaj la tre amuza muzeo *Malpermesite ne Tuŝi*, kie oni proponas al la vizitanto interagi plene kun ĉio, por lerni ludante. Oni ĉiam povas pasigi vere amuzan vesperon en la argentina ĉefurbo.

Nuntempe la urbo estas elektita kiel la plej bona turista cel-urbo en *Sudameriko* pro loĝado, kulturaĵoj kaj gastronomio. *Bonaero* estas plenplena de kafejoj, muzeoj, dancejoj, parkoj, teatroj, spektakloj, de urba arto surstrate, surmure, eĉ subtere. Ĉie aperas grafitioj, ornam-fileoj, intervenoj kaj okazaĵoj, murpentraĵoj, parkurado, pentristoj, mimoj, skulpturistoj, tamburado, rapistoj, dancistoj, magoj, inter aliaj diversaj artistoj kiuj vitale elanas en ĝiaj junaj kaj varmetosaj kvartaloj. Ne nur per tango la esperantistoj varmiĝos en *Bonaero* dum la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto.

kiam la argentina ŝtatisto kaj ili kreis novan movadon, kiu ŝanĝis profunde la estontan politikan vivon en Argentino: Peronismo aperas.

Evita kaj *Perón*. Ĵazmuziko populariĝis kaj Armstrong kaj *Gillespie* fariĝis pli kaj pli popularaj kaj konkuris kun la tangomuziko. Virinoj kaj novaj rajtoj plenigis la urbon. Virinoj kaj senlaboruloj. La politika vivo malfermiĝis al la *senhavuloj*.

Rimarkinde, la ora erao de tango atingis sian zeniton ĉe la fino de la *Peronismo*, kiam sursceniĝis roko, popo, tvisto kaj centoj da novaj bandoj naskiĝis. Spite de tio, ke tango restas profunde kiel radikoj kaj parto de la socia historio, en la koro de la loĝantoj la vivo disbranĉiĝas june kaj plene en pluraj urbaj artoj kaj novaj scenejoj.

Bonaero por junuloj kaj muzikemuloj

Agustina Pasavanti, juna kaj aktiva membro de *Juna Esperantistaro Argentina* (JEA) rimarkigas ke en *Bonaero* ekzistas granda diverseco de aktivajtoj por junuloj. Por komenci ni povus mencii mojosajn dancejojn. Oni povas elekti laŭ specifa tipo de muziko, jen rapo, jen salso aŭ roko, jen plurgenra stilo. Ĝuste tia estas la dancejo kaj restoracio Esperanto, kies dancokarton konsistigas roko, nacia roko, salso, popo, latino, regeo, internacia kaj elektronika

Vortareto

Senĉemizulo: laboristoj kaj senlaboruloj el socie malalta nivelo kiuj pledis por la liberigo de Perón. La nomo devenas de tiu tago, kiam amaso da senlaboruloj kaj malriĉaj laboristoj svarmiĝis en la Placo de Majo, kelkaj vestitaj kun ĵako, kelkaj kun ĉemizo kaj refaldita maniko, kelkaj nudaj je la torso. Kial Perón estis enkarcerigita? estas alia rakonto.

Placo de Majo: (hispane: Plaza de Mayo) Ĉefa placo en Bonaero, kie okazis la plej gravaj momentoj de la politika vivo en Argentino.


Okazaĵo: (angle: happening) arto partopreniga de ordinaraj personoj (ekzemple amaso da nudaj multkolore pentritaj personoj).

Interveno: Strata/Urba arto. Modifi publikan spacon laŭ arta kriterio de la artisto.

Felietono

Esperanto

La redakcio de la revuo Esperanto plukadas pluserojn el sia sekvantaro ĉe Guglo+



Jindřich Kostalek

komentis videon el YouTube: mi ŝatis viajn filmetojn. Daŭrigu!
<http://bit.ly/1cZt3L>

Takashi ITO

verkis hajkon en Esperanto:

*seke pasante
jen falinta folio
apud piedoj*

<http://bit.ly/191yZyD>

Maria Nazaré Laroca

komentis poemon de Paulo Nascentes: Jen mia ruza demando: ĉu poezio kapablas forviŝi la lirikan Mion? ;)
Bela poemo!
Poemo ĉe: <http://bit.ly/1evVLGw>



Ronald Schindler

komentis videon el YouTube (<http://youtu.be/PT-HBI2TVtI>)
"Tre impresa filmo pri helpopreteco – ni ĉiuj agadu simile!"

Herman Deceuninck

senkome diskonigis ligilon: "La mondo rigardata tra 3054 lingvoj en danĝero de formorto".
<http://bit.ly/1foRVcX>



Sekvu la revuon ĉe Guglo+

<http://bit.ly/19F2jia>

| Anekdotoj

El Anekdotoj en Esperanto:
<http://yhoo.it/1kjmOoH>



Kruko daŭre senespere amindumas la belan, junan Jasminon.

- Kruko: Ho, mi volonte oferus mian vivon por vi!
- Jasmino: Ĉu vi do mortus por mi?
- Kruko: Jes!!
- Jasmino: Ĉu baldaŭ?

Brila Komercesto

- Baniko: Nia ĉefo estas la plej brila komercesto en la tuta urbo.
- Kruko: Ĉu? De kiu vi havas tiun informon?
- Baniko: De li.

| Redaktaĵo

Instruante mi lernadas Esperanton

Aperos regule en Felietono redaktaĵoj de esperantistoj kiuj sukcesis trapasi la UEA/KER-ekzamenojn. Jen do Hikita Akio, la unua japana kandidato.

Kiam mi laboris en la nacia porblindula lernejo en Tokio okazis kunveno por rememori la rusan verkiston kaj esperantiston, Eroŝenkon. Mi ege interesiĝis pri lia vivo kaj fabeloj kiujn li verkis.

Do, mi decidis partopreni en tre-tre intensa kurso en 2012. Dum la kurso mi trapasis la KER-ekzamenon por B1-nivelo. Poste dum UK en Hanojo mi trapasis ĝin por B2-nivelo. En 2013 mi

partoprenis la ILEI-Konferencon en Herzberg kaj en septembro mi studis en la instruista trejnado ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM), en Pollando.

Lastatempe mi instruas Esperanton al komencantoj en nia urbo. Mi esperas, ke mi laboros kiel la rusa instruistino Anna Ŝarapova, kiu havis grandan influon sur Eroŝenkon.

Konsultu la liston de la ekzamensesioj:
<http://bit.ly/1dnsit9>




HIKITA Akio - B2



<http://bit.ly/1g5j8FQ>

ZÉCARLOS



Irina Gončarova sin prezentas

Mi estas Irina Gončarova – la homo, kiu staras antaŭ vi ĉe la malfermita pordo de la nova instrua projekto de Intraespo kaj Sunvojo – kaj ĉe la sojlo de la propra nova pasiiga sperto: instruado de la rusa lingvo pere de Esperanto. Emociplene mi atendas nian renkontiĝon.

Mi estas instruisto pri la rusaj lingvo kaj literaturo, laŭ la praktika sperto – instruisto de Esperanto. Ekde 1977 mi seninterrompe aktivas en la rusia E-movado kiel organizanto de junularaj aranĝoj kaj E-instruisto. Paralele kun ĉeesta instruado en urbaj E-kursoj, dum tri jaroj (1988-1991) mi laboris en la kooperativo por koresponda E-instruado. En la jaro 1991 mi iĝis administra direktoro en la Asocio Subtena de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AsAIS). En la Moskva ŝtata aŭtomobil-konstrua instituto (MASI) mi dum 17 jaroj (1994-2011) instruis Esperanton kiel devigan studobjekton. Mia universitata lernolibro (1995 - reeldonita en 2004) ricevis stampon de la Ministerio de Supera Klerigado, kiu rekomendas ĝin kiel lernilon por la studentoj de altlernejoj. Dum diversflanta AIS-aktivo mi iĝis adjunkto de AIS San-Marino kaj ricevis tie la sciencan gradon magistro humanitara, pro aro da verkita lernolibroj kaj aŭtora laboro.

Por altigi mian profesiecon konforme al niaj celoj, mi aliĝis al la 3-monata intensa kurso pri la instruado de la rusa kiel fremda lingvo, ĉe la Moskva ŝtata Lomonosov-universitato (MGU). Tio certe helpas min pli profesie kaj efike instrui la rusan lingvon al ĉiuj lernemuloj. Dankon por via konfido!

Saluton! Привет!

Ludwig Wittgenstein, filozofo de la 21-a jarcento, skribis “La limoj de mia lingvo estas la limoj de mia mondo”. Lernante naciajn lingvojn ni iras en nia mondo plu kaj plu trans ĉiujn limojn. La rusa lingvo estas unu el la plej grandaj en la mondo. Laŭ la kvanto de parolantoj la rusa lingvo estas la kvina. Ĝi estas labora lingvo de UN kaj unu el la plej popularaj lingvoj de interreto.

2014 estos Jaro de Kulturo en Rusia Federacio. La registaro kaj regionaj estraroj en la tuta Rusio planas fari multajn diversajn kulturajn aranĝojn. Pluraj muzeoj, teatroj, kulturdomoj kaj kluboj ricevos ŝtatan subvencion, kaj la kultura vivo en la provincoj plivigliĝos. Nacia kulturo estas firme ligita kun la nacia lingvo. La organizantoj de la kurso esperas, ke lernante la rusan vi pli bone ekscios pri la riĉa rusa kulturo, same kiel baldaŭ oni povos lerni ankaŭ la portugalan. Esperantistoj sciopovu minimume tri lingvojn: sian gepatran lingvon, Esperanton kaj unu fremdan lingvon.

Nova propedeŭtika ondo el Rusio kaj Brazilo

■ Mikaelo Ĉertilov kaj Irina Gončarova

La Manifesto de Prago estas furora dokumento vaste citata de esperantistoj en artikoloj, prelegoj kaj en reagoj kontraŭ misinformoj de la gazetaro. Sed ĝia plej kerna kontribuo al la movado apenaŭ sentiĝas en la praktiko: esti gvidolinio por agado, ne por nur senĉesa citado. Sed novaj ondoj ekbruas.

En la decembra numero de *Esperanto* raporto pri la iniciato de E@I por instruado de la germana, slovaka kaj ĉeĥa lingvoj per Esperanto montris la vojon. Ĉi-numere Esperanto raportas pri komuna projekto de la inform-eduka fako de la rusia firmao Sunvojo kune kun Monda Organizo por Disvolvado de la Esperantista Ekonomio (Intraespo), kiuj kunorganizas malĉeajn kursojn de la rusa lingvo en Esperanto, kaj estonte de la portugala por rusoj.

Ĉio estas ligita al pli ampleksa projekto por tutmonda disvolvado de novtipa industrio de lingvo-instruado, kies ĉefa fundamento estas la adopto de Esperanto kiel propedeŭtika lingvo. Aliflanke, en la brazila kunteksto la iniciato estas ligita al kampanjo por enkonduko de Esperanto kiel laborlingvo de grandaj kaj mezgrandaj

entreprenoj, planantaj tutmondiĝi sian agadon. Gravus atentigi ke la kurso de la rusa lingvo per Esperanto ne estas nur por brazilanoj. Homoj el la tuta mondo povos enkribiĝi kaj partopreni internacian kurson, kadre de pionira iniciato, kies kontribuo al la praktika uzo de Esperanto kiel propedeŭtika lingvo helpas akceli profesian aplikadon de Esperanto.

Praktikaj detaloj

La unua baza kurso de la rusa komenciĝos em februaro 2014 kaj daŭros du monatojn. La instruado okazos per ret-seminarioj (32 horoj). La fama rusia esperantistino Irina Gončarova – kiu profesie instruas Esperanton kaj la rusan – estos la instruistino. La lecionoj okazos dufoje en la semajno. La lernantoj ricevos la koncernajn studmaterialojn, faros ekzercojn, plenumos taskojn. Dum la tuta instruado ĉiutage la lernantoj havos eblon konsulti la instruiston pri la lingvo. Post la fino de la kurso la lernintoj ricevos inviton partopreni ĉeestan kurson por daŭrigantoj, kiu okazos en aŭgusto 2014 en Moskvo, kadre de *Somera Esperanta Studado* (SES) en Rusio, kie la kursanoj ricevos bonegan lingvan praktikon. Por ricevi pli detalajn informojn plenigu sen prokrasto la formularon ĉe <http://bit.ly/18Rp5Tc>

La rusa lingvo en Fejsbuko:



Boris Kolker

Rusiaj parlamentanoj deziras igi la rusan lingvon oficiala lingvo de Eŭropa Unio. Ĉu vi subtenas?

Steven Lytle Kurt

Ne “la” oficiala lingvo, sed unu el la oficialaj lingvoj. Se Rusio estus ano de la Eŭropa Unio, la rusa devus esti oficiala lingvo, alie ne.

Dirk Bindmann

Kvankam la rusa ne estas oficiala lingvo de EU, ĝi jam estas oficiala lingvo en EU. Laŭ <http://bit.ly/1zBkei> ĝi apartenas al la oficiale agnoskitaj minoritataj lingvoj en Finnlando kaj en Rumanio.

Ingolf Jandt

Kelkaj komentintoj rimarku la malsamon inter “oficiala lingvo de EU” kaj “La oficiala lingvo de EU”.

Unua Alineo

Paĝo por komencantoj kaj komencintoj - facilaj tekstoj, gramatikaj notoj, klarigoj pri lingvo, stilo, formo ktp.



Fasono/Dezajno

Do, kiun vorton uzi?

La revuo Esperanto pepis per Twitero: Por la redezajno de la revuo Esperanto laboras du altnivelaj profesiuloj.

Renato Corsetti komentis: *@revuo_esperanto* estus pli bone se ili laborus pri la refasonado ol pri la redezajno.

Multaj pretas defendi la Bonan Lingvon, sed ĉu ni baraktu kontraŭ evoluado de la lingvo? Kion signifas evoluado, se temas pri Esperanto? En la diskutlisto La Bona Lingvo ekestis diskutado pri la du vortoj:

– “Fasoni” estas ne tute taŭga vorto por la afero difinita per “dezajno”. “Dezajno” estas, ni diru, tre specifa fasonado sur la kampo de grafiko, industrio. (Fabrício Valle)

– Mi opinias, ke “dezajno” estas la usona maniero elparoli “deseĝno”. (Renato Corsetti)

– Mi mem neniam uzas la vorton “dezajni” aŭ “dizajni”, kiu ŝajnas esti sufiĉe nova aldono al la Esperanto vortoprovizio. Ĝi certe ne ekzistis, kiam mi lernis la lingvon! Do, kiel la homoj elturniĝis, antaŭ ol oni enkondukis tiun laŭmodan vorton prenitane el la angla? Per la Fundamenta vorto “fasoni”, sed ankaŭ per aliaj vortoj, ekzemple “stilo”, “formo” ktp. Per tiaj aldonaĵoj al la lingvo, la vortoprovizio de Esperanto konstante

kreskas. Kompreneble la malnova radikoj ne malaperas, do nun la lingvo havas du aŭ tri vortojn kun la sama signifo, dum antaŭe estis nur unu. Esperantistoj ŝatas fanfaroni, ke Esperanto estas la plej facila lingvo de la mondo. Sed kiel ĝi povos resti facile lernebla, se lernantoj devos enkapigi ĉiam pli ampleksan vortostokon? (Anna Lowenstein - legu ŝian tutan artikolon: <http://bit.ly/1y24uD>)

– Mi plene konsentas kun ĉio, kion Anna skribis pri la afero. (Marcos Cramer)

– La problemoj estas, ke la nova vorto, kiu venas por redifini la misdifinitan aŭ ne kompletan koncepton, havas sian propran misecon aŭ strangecon. La nova vorto estas multfoje pli misdifina aŭ pli nekompleta ol la antaŭa vorto. (Josenilton)

Apenaŭ konklude: kelkaj esperantistoj eventuale opinias, ke “dezajni” havas ian signifon, kiu mankas en la Fundamenta vorto “fasoni”. Tamen, esploroj en la Tekstaro (<http://bit.ly/1cAw58h>) montras, ke la du vortoj aperas en precize la samaj kuntekstoj.

La revuo Esperanto uzos la vorton “fasono” dum kelka tempo, kaj invitas la esperantistaron opini voĉdone ĉe <http://bit.ly/1kn1CLy>

Nur por junaj koroj pli ol 30 jarojn aĝaj

Kio estas Patrono de TEJO? Ĉu vi scias? Ne estas pli bona okazo ol la nova jaro por lerni novajn aferojn: patrono estas subtenanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la junulara sekcio de UEA. Oni pagas trioblon de la MJ-kotizo de sia lando, kaj la patroneco jardaŭros, tio estas, daŭros unu jaron, kaj ĉiuj povos resti patronoj por ĉiam, dum la koro junos.

Kutime la patronoj estas homoj, kiuj jam transpasis la tiel nomatan TEJO-aĝon (t.e. 30-jarojn). Tamen ilia juneco ĉiam renoviĝas, kaj oni neniam forgesas la gravan rolon de la junularo en la Esperanta movado.

Kompreneble la patronoj ne nur donas ion, sed ankaŭ ion ricevas. Kiel TEJO-membroj, ili ricevas la socikulturajn revuon *Kontakto*, kun la rubriko TEJO-Tutmonde, kaj povas aliĝi al la Internacia Junulara Kongreso kun granda rabato.

Krome, ili ricevas apartan informilon - *Patrona Letero* - kvarfoje jare. Fine, ili povas partopreni, dum ĉiuj Universalaj Kongresoj, en la Patrona Akcepto. En tiu ĉi speciala okazaĵo, kelkaj aktivuloj de TEJO raportas pri la agado de la antaŭa jaro kaj pri la estontaj projektoj de la organizo. Oni ankaŭ respondas al la demandoj de la patronoj, oni aŭskultas iliajn saĝajn konsilojn, kaj kompreneble la junularo oficiale dankas al la patronoj pro la subteno. Ĉio kutime finiĝas per kunfestado, kun manĝoj kaj trinkaĵoj, en neformala etoso.

Evidente patroniĝi bonas por la sano kaj por la humoro: pripensu tion, okaze de la nova jaro!

■ Manuela Ronco



Pri homoj

Juna Amiko estas revuo de ILEI por vi, por viaj infanoj, nepoj, lernantoj. Vi trovos en ĝi ludojn, kvizojn, facilajn tekstojn, amuzajn faktojn pri landoj pri homoj, pri kutimoj, pri bestoj.



Pri kutimoj

ilei

Vi lernas, ILEI helpas.

ilei.info



Federico Gobbo (1974) estas laŭkontrakta docento ĉe Universitato de Torino (Italio) per kurso pri Planlingvistiko.

“Esperanto sin difinas maletne, per etiko”

Federico Gobbo baldaŭ transprenos la katedron de Interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo. Por li la kadro de la fako estas sufiĉe komplika.

■ Ivan Colling kaj Maria Laroca

ER: Kio estas interlingvistiko?

FG: En la tradicio kie fontas Esperanto, interlingvistiko estas subfako de lingvistiko dediĉita al la esplorado kaj pristudado de internaciaj helplingvoj. Kutime oni komencas ekde Volapuko, pristudas Esperanton, ofte kompare kun aliaj postaj konkurantoj, kiel ekzemple Ido aŭ Latino sine Flexione. Efektive nun la termino estas ambigua, ĉar aliaj fakaj rondoj ĝin uzas alisignife. La kadro do estas sufiĉe komplika. Kaj lastatempe la klasika interlingvistiko, t.e. pristudado de internaciaj helplingvoj, estas pli kaj pli integrata en la subfako lingvopolitiko kaj -planado (LPP), sekvante sugeston, kiu fontas de Valter Tauli, grava estona lingvisto tre aktiva en la 60-aj jaroj.

ER: Kial interlingvistiko ankoraŭ ne ricevis la statuson de universitata studobjekto, kio faciligus ĝian enlistigon en la kadrojn de Magistrigaj kaj Doktorigaj kursoj en multaj universitatoj?

FG: Ne komplete veras, ke interlingvistiko (mi celas klasikan interlingvistikon) nenie ricevas statuson de universitata studobjekto; en Amsterdamo, ekzemple, ĝi estas instruata al bakalaŭraj studentoj, dum en Torino estas la magistrigaj studentoj en Lingvosciencoj kiuj rajtas ekzameniĝi. Laŭ listo kompilita de Germain Pirlot, Esperanto estas instruata nuntempe en 69 universitatoj en 24 landoj.

1

2

ER: Kiuj estas la ĉefaj nuntempaj esploristoj pri interlingvistiko kaj kiel status ilia laboro?

FG: Grava esploristino en Eŭropo estas Sabine Fiedler (Leipzig, Germanio), kiu esploris aparte la frazeologion de Esperanto. Goro Christoph Kimura (Sofia Universitato, Tokio, Japanio) laste esploris socilingvistike la Esperanto-komunumon kompare kun minoritataj lingvoj. Alia interesa esploristo estas Tsvi Sadan (israelano japandevana, nome Tsuguya Sasaki, nun laboranta ĉe Bar-Ilan Universitato, Israelo); li estas lingvisto, kies ĉefaj esploroj estas la novhebrea kaj la jida lingvoj; ekde tiuj perspektivoj li skribis multe pri la Esperanta kulturo – kaj nuntempa, kaj pionirepoka. Estas grave noti, ke ĉiuj universitatoj devas havi alian fakon, flanke de interlingvistiko, por pluvivteni la karieron. Interlingvistiko sola ne sufiĉas. Mi volas min limigi nur al la universitatoj, ne la sendependaj esploristoj, eĉ se de ili foje venas tre bonaj ideoj.

ER: Kian rolon ludas la kurso de Poznań? Ĉu temas pri ekvivalentaĵo al via katedro en la ĝenerala kadro de la fako?

FG: Mi opinias, ke la interlingvistikaj studoj en Pollando estas unikaĵo. Unue, ili postulas de la partoprenantoj bonan scion de nia lingvo, ĉar la lecionoj okazas en Esperanto. Due, temas pri kursaro, ne ununura kurso, kaj fakte ili daŭras tri jarojn. La kurso en Amsterdamo estas pli ordinara, kaj ĝi okazas ĉiun akademian jaron denove, alivorte ne ekzistas unua, dua, tria kursoj de interlingvistiko kiel en Poznań. Oni instruas la fakon ne rekte en Esperanto, sed en alia lingvo – mia antaŭulo, Wim Jansen, uzis la nederlandan; mi uzas la anglan. Tamen Esperanton mi instruos almenaŭ parte rektemetode, tio signifas, ke mi parolos en Esperanto en la klaso. Notu, ke neniam antaŭkono de Esperanto estas postulata al la kursanoj en Amsterdamo.

ER: En ĉiuj lingvokomunumoj estas io komuna, kiu kunligas la parolantojn. Kiel laŭ vi en la nuna, post-moderna epoko esperantistoj sentas tiun

3

4

5

“internan ideon”? Ĉu ĝi multe ŝanĝiĝis kun la paso de la tempo? Kiel ĝi diferencas (se ĝi diferencas) disde lingvosentoj de komunumanoj de aliaj minoritataj lingvoj?

FG: Ĝis nun mi ne faris enketon inter la esperantistoj pri tiu temo, do mi ne scias kion esperantistoj ĝenerale sentas. Mi volas substreki, ke Esperanto, kvankam uzata de malmajoritata grupo dise tra la mondo, ne estas minoritata lingvo, en la normala senco de tiu esprimo uzata inter lingvistoj kaj institucioj, kiel ekzemple EU. Minoritataj lingvoj sin difinas per etiko, dum Esperanto sin difinas maletne, per etiko. Kaj la fundo de tiu ĉi etiko estas paroli inter diversaj nacioj per “lingvo neŭtrale-homa”, por uzi la ankoraŭ aktualan esprimon de Zamenhof.

ER: En la fenomeno de lingvoj uzataj/uzitaj por internacia komunikado – kiu estas la celobjekto de interlingvistiko – grava demando estas variado de tiuj lingvoj kaj dialektiĝo. Kiu estas via opinio pri dialektiĝo de Esperanto?

FG: Kiel mi klarigis jam antaŭe, internacia komunikado estas ĉefa temo de interlingvistiko, sed ne la nura. Ne ekzistas dialektoj de Esperanto, ĉar la varia uzo de la lingvo ne estas tro influata de la deveno de la parolanto, se la lingvonivelo estas sufiĉe bona. Ĉu Esperanto povas disfali samkiel Latino? Ne! Bonŝance la Romia Imperio estis unikaĵo en la homa historio.

ER: Kiel vi reagis al la Chomsky-a aserto, ke “Esperanto ne estas lingvo”?

FG: Ho ve! Mi jam reagis freŝdate al tiu stultaĵo en 2008 anglalingve en mia tiam blogo. Anekdotke, li asertis tion dum intervjuo fare de Mark Aronoff, kiu cetere enkondukis la temon ne malbone. Estas ĉiam danĝere paroli pri temo, kiun oni ne konas, kaj eĉ pli danĝere kiam lingvisto parolas pri lingvo, kiun li nek regas nek spioras... Esperanto ne estas escepto tiurilate. Aliflanke, eĉ la plej influa vivanta lingvisto povas erari fojfoje – kaj Chomsky sendube estas, eĉ neŝatante koncedas! Mi pensas, ke post la apero en 2010 de la volumo Lingvo kaj menso eldone de UEA, kiu enhavas gravajn kontribuojn de Chomsky en nia lingvo, li ŝanĝis sian opinion pri Esperanto.

6

7

La unuaj vortoj de la redaktoro B

■ **Fabrizio Valle**

Be! B entute ne kredis ke brazila redaktoro ne posedanta la bakalaŭrecon, post pli ol 100 jaroj da eŭropaj baladoj en baloj nur por bardoj, sciante deklami nek Bajronon nek Bloderon, sukcesus trovi breĉon por partopreni bankedon en Babelo, kiel nova redaktoro de la revuo Esperanto. En Bagdado jes, kiam invitite de Belŝacaro, la babilona reĝo. En Bahamoj post multe da baraktado. Foje en Burundo! Sed en Babelo tute ne. Babelo ne estas bagatela facilajo por balbutuloj kiuj dum jaroj nek pagis la UEA-kotizon nek babiladis en konversaciaj rondoj de E-bodisatvoj, nek ĉeestis prelegojn de akademiakaj beletristoj. B nur festenis per briĉoj kaj babaoj en krokodilaj rondoj kaj kiel barbaro rajdis bejan ĉevalon.

Sed estis necese nek doni bakŝiŝon por malbari al li la vojon nek malkaŝe transpasi la barbakanon. Sufiĉis kelkaj boteloj da bona biero ĉe la trono de Baduro, sub baldakeno, kaj danco kun bajadero dum Bajramo kaj jen li estis antaŭ Beatrico, ne akompanata de Dante, sed de Bakko, en Benelukso, kiel la unua ne eŭropano en la bastiono!

Eŭropo, la patrino de la okcidenta civilizacio! Bravure kaj bunte ĝi regalas nin: la filozofio el antikva Grekio, Francio kaj diversaj olimpaj montoj tra la kontinento, ne nur helenaj. Renesanco, Nica Revuo, la franca revolucio – libereco, egaleco, frateco. Skolo de Budapeŝto, la Industria Revolucio, Betoveno, UNESKO-rezolucio por Esperanto kaj Esperanto mem kaj multe pli (longas varietea defilo!). Eŭropo estas por Esperanto iu Belerofono, kiu mortigis Himeron. Ĝi akumulis bonifikojn por Esperanto dum jarcento kaj kvarono. Eŭropo instruis nin, ke berlinaj muroj ne eternas. El ĝi venis Brigitte Bardot kun sia bikino (hodiaŭa brokantaĵo kompare al brazilaj bikinoj!).

Kial do transloki la redakcion al alia kontinento? Ni ne perdu nian tempon per bizancaj diskutoj! Eŭropo estas ja brilanta, sed la aliaj kontinentoj ne estas balastaĵoj!

Ĉiuj kune, Eŭropo, Azio, Amerikoj (ne nur la norda), Afriko kaj Oceanio bezonas trovi novajn vojojn por la movado.

Ĉefe ĉar la mondo bolas, tutmondiĝas la barakaro kaj brikoj sursceniĝas reliefe, Esperanto nur kiel amata ĉevaletto, kiel intelekta ludo, kiel okupo de nur brilaj intelektuloj, ne plu povas hegemonie dikti la irendan vojon en Esperantujo: ni enkonduku Esperanton en la brilan revuon de Berthelot kiel laborlingvon, kiel fonton de laborpostenoj, de enspezofontoj, de globaj negocoj, kiel ilon de sociala kaj eduka laboro. Ĝis nun la esperantistoj laboris por ke la mondo lernu Esperanton, nun venas la tempo por ke la esperantoj transformu la mondon per Esperanto. Ni ne atendu ke la mondo adoptos Esperanton. Ja ni ĝin adoptu!

Prenu kelkajn biskotojn kaj biskvitojn kaj aŭskultu: la revuo investos ankaŭ sur la alian flankon de la monero: instruadon de esperantologio, interlingvistiko, beletro, movada strategio, e-merkato kaj bona lingvo al ĉiuj siaj legantoj. Baldaŭ Esperantujo havos barikadon je novaj talentoj, tiel gloraj kiel Boulton, Bein, Baniko kaj ceteraj movadaj buldozoj. Komprenu ke flagoj verdaj svingiĝas en ĉiuj belvederoj, eĉ en Bandungo kaj baldaŭ

eĉ en borso de bankieroj en Bajreno, Bankoko kaj Baltimoro, ĝis malfina benko.

Kaj ĉar mono dio ne estas, unu foje jare B meditos marĝene de Bramaputro pri Bramo, ĝis B iĝos Budao. Poste B iros al Banaraso kaj tie recitos ĉi versojn de Bagavadgito:



Kiu ne komencis agi,
ne alvenos al ripozo;

ne atingos perfektecon,
kiu restados senaga.

Tute senaga neniu eĉ
momenton esti povas,

ĉar ĉiun lia naturo
ĉiam igas fari ion.

Kaj ni ne forgesu amuziĝon, ĉu kun bigotoj, ĉu kun bravuloj, ĉu kun bizaruloj: barakaton kaj bufedon, bierojn kun bavaroj en Bogoto, brandon en Belfasto, kabaredon en Bairikio, baleton en Balho, balalajkon ĉe la profundega lago Baikalo. Kaj ĝuadon de bosanova kanzono en Braziljo: <http://bit.ly/18gOgAs>

La novbakita brazila redaktoro bezonas fini siajn unuajn vortojn: sufiĉas, bufono! Li multe b-umis kaj diris preskaŭ nenion, nur banalaĵojn. Ne bravas. Vivu la beduenoj kaj la bantuoj! Vivu Bolivio! Vivu UK en Bonaero! Vivu Belgrado! Vivu la belorusoj kaj bulgaroj! Vivu Berta kaj ĉiuj virinoj! Vivu la bilancoj kaj biloj de Buller! Vivu la biblioteko Hodler! Vivu la banko kie UEA deponas la monon de la novaj aliĝoj kaj donacoj! Vivu la budĝeto por 2015! Vivu la bugenviloj! Vivu Bulonjo ĉe Maro! Vivu Bjalistoko! Bis!



Fabrizio Valle
havas blogon ĉe
www.redaktoro-b.com.br



En 2013 144 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK, kaj specialan donaceton. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

DANĜERO



La danĝera lingvo. Ulrich Lins. Dokumentita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en cara Ruslando, orienta Azio kaj en la Ligo de Nacioj. Moskvo: Progreso, 1990 (2a eld.). 568p. 20cm. Bind., ilus. €21,00.



La vivo kaj morto de Vladimir Varankin (1902-1938). Nikolao Stepanov. Originala biografia studo pri sovetia esperantisto (kaj verkisto). Fenikso, 1990. 32p. 24cm. Prezo: €1,80.

internaciaj ekzamenoj de ilei/uea



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaĵoj. Taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj. Tria eldono. Rotterdama: UEA/ILEI, 2008. 38p. 21cm. Prezo: €4,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

La Komuna Eŭropa Referenckadro

Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj

LA KOMUNA EŬROPA REFERENCKADRO.

Roel Haveman, Katalin Kováts kaj István Ertl. Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj. Rotterdama: UEA, 2007. 24p. 21cm. €3,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

REMEMOROJ EL BENGALIO

MI JUNA.

Manashi Das Gupta.
El la bengala trad.

Probal Daŝgupto. Rotterdama: Esperantaj Kajeroj, 1989. 102p. 21cm. Prezo: €2,70.

La vivo en Bengalio dum la 1930aj kaj 1940aj jaroj el la perspektivo de sendependema knabino. Flua, plaĉa stilo.



LEGOLIBRO EL KANADO


LITO APUD LA FENESTRO.
Betty Salt. Rotterdama: UEA, 1999. 108p. 21cm. Prezo: €4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.



TREZOROJ

REPRESO



La trezoro. Komp. Hussain M. Al-Amily. Ilustrita kolekto de 3 000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo; kun klarigaj notoj. Rotterdam: Araba Komisiono de UEA, 2008. 137p. 24cm. Prezo: €15,00.

Elpafu la sagon. Komp. kaj trad. Tibor Sekelj. Ilustrita antologio de buŝa poezio, grandparte de popoloj, kies kulturo ankoraŭ ne estis reprezentita en Esperanto. Rotterdam: UEA, 1983. 187p. 21cm. Prezoj: €9,60 (bind.); €7,50 (broŝ.).

Esperanta antologio. Poemoj 1887-1981. Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto. Rotterdam: UEA, 1984 (2a eld.). 12+888p. 22cm. Bind. Prezo: €9,00.

Reeĥoj. Jugoslavia poemaro. Poemoj de 19 Esperantaj poetoj; multaj el ili antologiaj. La Laguna: J. Régulo, 1961. 112p. 19cm. Prezo: €1,80.

Proverbaro esperanta. 2 630 zamenhofaj proverboj. La Laguna: J. Régulo, 1974 (2a eld.). 168p. 19cm. Prezo: €6,00.

Vienaj legendoj antikvaj kaj originalaj. Kvar malnovaj kaj tri modernaj historioj. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1992. 40p. 21cm. Prezo: €3,00.

Ĉe la Libroservo de UEA
triona rabato por samtempa aĉeto de
minimume tri ekzempleroj de la sama titolo.

Serio "Oriento-Okcidento" de UEA

Serio "Oriento-Okcidento" estas la plej longedaŭra el la kontribuoj de UEA al projektoj de Unesko. En ĝi aperis 49 numeritaj kaj 3 nenumeritaj libroj, tradukitaj el ĉ. 25 lingvoj.

El tiuj, 2 estas verkitaj de amerikaj aŭtoroj.



N-ro 5. **Martín Fierro.**
José Hernández. El la hispana trad. Ernesto Sonnenfeld. La nacia eposo de Argentino. Pri la sorto de la gaŭĉoj. La Laguna: J. Régulo, 1965. 289p. 21cm. €6,00. Triona rabato ekde 3 ekz.



N-ro 27. **Cent jaroj da soleco.**
Gabriel García Márquez. El la hispana trad. Fernando de Diego. Magirealista romano de la Nobel-premiita aŭtoro. Chapecó: Fonto, 2012 (2a eld.). 317p. 21cm. €23,40. Sesona rabato ekde 3 ekz.